

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

9

1993

中國報通

EL POPOLA

ĈINIO





Pino simila al kuŝanta drako

Foto de LI CHUNGENG

INTER NI

En n-ro 5, ĵus ricevita, mi legis kun plezuro pri "En Koka Jaro" sur p. 20, sed ho ve, ne pri "kokobatalo"! Laŭ mi ĝi estas kruela kaj abomena distriĝo per torturado de birdoj, same kiel en Hispanujo la "bovobataloj". I.a., en Britio tiu distraĵo estas leĝe malpermesita.

B. NAJBARO
(Britio)

Mi estis ege dolorata, kiam mi legis en "El Popola Ĉinio"; ke oni permesas kruelan spektaklon kiel kokobatalo.

Mi estas konvinkita, ke indiferenteco pri la sufero de animaloj estas la vojo, per kiu ni lernas indiferentecon al la sufero de homoj.

Kompatato pri ĉiuflanka sufero ne estas signo de malforteco aŭ

sentimentalaĉo, sed signo de vera forteco kaj grandanimeco el la koro kaj imago.

DAVE GODIN
(Britio)

Ni ne atendis, ke al niaj britaj legantoj ne plaĉas la raportaĵo pri kokobatalo. Estonte ni ne aperigos tian raportaĵon.

La Red.

Mi opinias, ke oni povas konsideri la fotojn kiel helpilon perfektigi en Esperanto, ĉar bildoj pli bone fiksigas en la cerbo. Almenaŭ oni povas pli bone rememori la vortojn, vidinte la bildojn.

Krome la teknike kaj komponite belaj fotoj multon esprimas pri la ĉina vivo kaj kulturo. En neniuj eŭropa revuo, Esperanta aŭ ne, oni vidas bildojn pri ekz. "Prezentado de Sertara tibeta teatraĵo", "Ĉeval-konkurso"

kaj "Solena budhista kunveno".

Ankaŭ trafis min fotoj kiel tiuj de Wu Xinhua "La ronda Luno" kaj "En Pamiro".

Kelkaj aliaj legantoj konsilis malpliigi la bildpaĝojn. Sed... mi estas certa, ke multe pli aliaj konsilas almenaŭ firmteni la kvanton de la bildoj, ĉar ili estas ne nur bonkvalitaj, sed ankaŭ tre lernindaj.

Kaj mi povas diri, ke ĉiuj legantoj de EPĈ el nia grupo samopiniis. Ankaŭ tiu reago eble trovas lokon en via revuo?

JAN C. J. DEN TOONDER
(Nederlando)

Pro la altiĝo de kosto de eldonado de EPĈ, ekde n-ro 7 de 1993 ni iom malmultigas kolorajn bildojn, sed multigas nigra-blankajn. Kaj la kvanto de la bildoj estas ĝenerale sama kiel antaŭe.


La Red.

ENHAVO

- 2 *INTERNI*
- 4 **Pri restarigo de la suvereneco de Ĉinio super Hongkong**
- 6 **Malfacila ekflugo de la ĉina civila aviado**
- 8 *REFORMADO:*
Pri reformado al la ĉina financa sistemo
- 9 *AMUZOJ*
- 10 *HISTORIA MISTERO:*
Kiam budhismo enkondukiĝis en Ĉinion ?
- 12 Intervjuo al Sabira
- 14 Eksperimento en Slavjansko
- 14 *SUR NIA LIBROBRETO:*
Aventuroj de rikiŝisto
Moroj de ĉinaj nacimalplimultoj
- 16 *POR KOMENCANTOJ:*
Pri nia dekkvintaga restado en Gresillon
- 17 *ESP-NOVAĴOJ*
- 20 *VERDIGO EN ĈINIO:*
Verdigo en centra Ĉinio
- 24 *ITINERO PROPONITA:*
Antikvaj ĉefurboj de Ĉinio
- 25 Ĉinaj "Sistinaj Freskoj"
- 28 Vizito al la Fantoma Urbo
- 29 *SUR STRATOJ:*
Motorciklo — modo de ĉina urbeto
- 32 Muziko kaj danco por kulti Konfuceon
- 36 Invento de ĉinaj studentoj
- 38 Solena sportkunveno de la orienta Azio
- 41 *POR VIA SANO:*
Kuracado de astmo
- 42 Iom pri la tibeta medicino
- 46 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 47 Kiel disvolviĝas agrikulturo de la mondo
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *METIARTAĴOJ:*
Pastomodlisto Tang
SUR LA KOVRILO:
Muzikistino en antikva kostumo
- Foto de **Zhong Ju**
- 2 Pino simila al kuŝanta drako
- 18 Akvoellasa ceremonio ĉe Dujiangyan
- 34 Internacia geedziĝo
- 44 Orkestroj en elementaj lernejoj
- SUR LA DORSKOVRILO:*
Sur monta vojeto

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Henan-provinco (p. 24)
2. Foshan (p. 29)
3. Tibeta Aŭtonoma Regiono (p. 42)
4. Fengdu-gubernio (p. 28)
5. Qufu (p. 32)
6. Kaifeng (p. 24)
7. Luoyang (p. 24)
8. Xi'an (p. 24)
9. Ŝanhajo (p. 38)



Pri restarigo de la suvereneco de Ĉinio super Hongkong

NIAJ legantoj skribis al ni, kio estas la problemo pri Hongkong. Por kontentigi ilin mi respondos la demandon detale.

Hongkong konsistas el Hongkong-insulo, Jiulong (Ĝiulong) kaj Xinjie (Ŝingje) kaj havas la areon de 1 067 kvadrataj kilometroj. Ĝi situas oriente de la buŝo de Perlo-rivero kaj antaŭe estis administrata de Xin'an (Ŝjin'an)-gubernio (poste Bao'an-gubernio, t.e., la nuna Shenzhen) de Guangdong-provinco. De antikve Hongkong apartenas al Ĉinio.

En la Opia Milito en 1840 Britio invadis Ĉinion kaj devigis la registaron de Qing-dinastio (1644-1911) subskribi la "Nankina Traktato" en 1842 kaj koncesii Hongkong-insulon al ĝi. Post la Dua Opia Milito en 1856 la registaro de Qing-dinastio devigite subskribis la "Pekina Traktato" en 1860 kaj koncesii al Britio la regionon sude de Jiexian (Ĝješjan)-strato en la suda parto de Jiulong-duoninsulo. Post la Mara Batalo inter Ĉinio kaj Japanio en 1894, kiam multaj potencaj landoj dividis Ĉinion, Britio devigis la registaron de Qing-dinastio subskribi la "Traktato por Plivastigi la Koncesiitan Hongkong" en 1898 kaj

koncesii al ĝi la nordan parton de Jiulong-duoninsulo kaj ĉirkaŭajn pli ol 200 insuletojn norde de Jiexian-strato kaj sude de Shezhen-rivero. La koncesiiteco daŭros ĝis la 30-a de junio 1997.

La tri traktatoj estas la rezulto de la agresado de la potencaj landoj al Ĉinio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la ĉina registaro multfoje deklaris, ke Hongkong estas teritorio de Ĉinio kaj Ĉinio ne estas katenita de la tri maljustaj traktatoj subskribitaj de la registaro de Qing-dinastio. Koncerne la historian problemon, la ĉina registaro ĉiam proponas, ke ambaŭ flankoj pace solvu ĝin en konvena tempo per intertraktado. Antaŭ ĝia solvado oni devas teni la nunan staton.

Proksimiĝas la fino de la koncesia tempo de Xinjie kaj solvenda estas la problemo pri Hongkong.

En septembro 1982, la brita ĉefministro s-ino Margaret Thatcher vizitis Ĉinion. Ŝi faris profundan diskutadon pri tiu problemo kun ĉinaj gvidantoj. Ambaŭ flankoj klarigis sian starpunkton kaj konsentis daŭre diskuti pri ĝi per diplomatia vojo. Post 22-foja intertraktado de julio 1983 ĝis septembro 1984 la delegacioj de la du landoj atingis la interkonsenton kaj en la 19-a de de-

cembro 1984 oficiale subskribis en Pekino "La Komuna Deklaracio de la Problemo pri Hongkong Farita de la Registaroj de Ĉinio kaj la Unuiginta Reĝlando de la Granda Britio kaj Nord-Irlando". En la 27-a de majo 1985, la registaroj de la du landoj interŝanĝis la Sankciajn Librojn de la Komuna Deklaracio en Pekino. De tiam validas la komuna deklaro kaj Hongkong eniris en transiran periodon.

La komuna deklaro difinas: "La registaro de la Ĉina Popola Respubliko restarigos sian suverenecon super Hongkong en la 1-a de julio 1997 kaj Britio tiutage redonos Hongkong al Ĉinio.

Konsiderante pri la stato de politiko kaj ekonomio kaj la nivelo de produktado de la nuna Hongkong, la ĉina registaro, surbaze de la politiko "unu lando kaj du sistemoj", deklaris, ke ĝiaj bazaj politikoj pri Hongkong ne ŝanĝiĝos dum 50 jaroj.

Estas bone konate, ke en la libera havenurbo Hongkong prosperas la industrioj de vesto, tekstilaĵo, plasto, ludilo, elektrono k.a. Ĝi estas unu el la centroj de komerco, trafiko kaj financo en la regiono de Azio kaj Pacifiko. Laŭ statistiko farita de la Disvolva Programo de UN, en 1989 la nivelo de la tuta ekonomio de Hongkong okupis la 23-an lokon en la



Parto de Hongkong

mondo, pli altan ol tiu de la disvolvigantaj landoj kaj regionoj, sed malpli altan ol tiu de plejparto de la evoluantaj landoj kaj regionoj. Por atingi la nivelon de la tuta ekonomio de la evoluantaj landoj kaj regionoj, Hongkong bezonas ankoraŭ multajn jarojn. En tiu historia periodo praktiki la politikon “unu lando kaj du sistemoj” en Hongkong kaj ne ŝanĝi ĝian kapitalisman sistemon utilos al ĝiaj socia stabileco kaj ekonomia disvolvigo.

La Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio aprobis “La Fundamenta Leĝo pri la Speciala Administra Regiono Hongkong de la Ĉina Popola Respubliko”. En leĝa formo ĝi difinis la ĝeneralan politikon de “unu lando kaj du sistemoj” kaj la fundamentan politikon de la ĉina registaro por Hongkong.

Laŭ la fundamenta leĝo, post la restarigo de la suvereneco kontraŭ Hongkong, Ĉinio instalos la Specialan Administran Regionon Hongkong. Krom tio, ke la rajtoj de la nacidefendo kaj eksteraj aferoj estos tenataj de la Centra Popola Registaro, Hongkong havos plenan aŭtonomecon en administrado, leĝdonado, jurisdikcio kaj lasta instanco. Restos senŝanĝaj la ekzistantaj socia kaj ekonomia sistemoj, vivmaniero kaj leĝo de Hongkong.

La fundamenta leĝo difinas, ke Hongkong povos mem ellabori siajn sistemojn kaj politikojn pri valuto kaj financo por garantii la ekonomian liberecon de la financaj entreprenoj kaj merkato. La valuto de Hongkong povos esti daŭre uzata kaj libere ŝanĝata kontraŭ alia mono. La bankoj, kiuj emisias hongkongajn monbiletojn, povos daŭre emisii ilin post 1997. Ĉinio ne praktikos la administran politikon al alilandaj valutoj en Hongkong. La merkatoj pri alilandaj valutoj, oro, valorpapiroj k.a. estos daŭre malfermitaj, por ke la kapitaloj cirkulu libere. Interne de Ĉinio, ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj ĉiujare donas parton de sia financa enspezo al la ŝtata financa departemento. La Speciala Administra Regiono Hongkong estas la plej riĉa loko en Ĉinio, tamen ĉiujare ĝi devos doni neniom da enspezo al la ŝtato kaj la lasta kolektos nenian imposton de ĝi.

Post 1997 Hongkong ankoraŭ estos libera havenurbo. Escepte de cigaredo, vino, kosmetikaĵo kaj benzino, la alilandaj varoj estos senimposte vendataj en malaltaj prezoj en Hongkong. Post 1997 la alilanda investado en Hongkong estos daŭre protektata laŭ leĝo, t.e. la registaro egale traktos la

alilandan investon kaj lokan kapitalon. Laŭ leĝo la alilandaj investantoj povos libere fari investadon en Hongkong.

La garnizonanta trupo, sendita de la Centra Popola Registaro, ne intervenos en la aferojn de Hongkong. En la eksteraj aferoj la delegitoj de la registaro de la Speciala Administra Regiono Hongkong povos esti kiel membroj de la delegacio de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj partoprenos la diplomatian intertraktadon, internaciajn organizojn kaj kunvenojn, kiuj ĉiuj koncernos Hongkong. En la nomo “Hongkong de Ĉinio” ili povos partopreni internaciajn organizojn kaj kunvenojn kaj en la kampoj de ekonomio, komerco, financo, navigo, telekomuniko, turismo, kulturo, sporto k.a. Hongkong povos teni rilatojn kun ĉiuj landoj, regionoj kaj koncernaj organizoj, subskribi kaj plenumi interkonsentojn. Hongkong povos liveri pasportojn de la Speciala Administra Regiono Hongkong de la Ĉina Popola Respubliko kaj aliajn legitimilojn por vojaĝo kaj stariĝi en aliaj landoj registarajn aŭ duonregistarajn ekonomiajn aŭ komercajn organizojn. Unuvorte, ĉiuj kondiĉoj, de kiuj dependas la prospero de Hongkong, estos laŭeble restigitaj kaj daŭre akcelos la disvolviĝon de la loko.

Ĉe ni estas ankaŭ la problemoj pri Aomen simila al tiu pri Hongkong. Aomen kun areo de 16.14 kvadrataj kilometroj situas okcidente de la buŝo de Perlo-rivero. De post la mezo de la 16-a jarcento ĝi estis paŝon post paŝo okupita de Portugalio. Laŭ la principo “unu lando kaj du sistemoj”, post la intertraktado pri la problemoj pri Hongkong inter Ĉinio kaj Britio la registaroj de Ĉinio kaj Portugalio subskribis la interkonsenton, ke en la 20-a de decembro 1999 Aomen revenos al Ĉinio. Tiel la problemoj pri Hongkong kaj Aomen estas sukcese solvitaj. ■

LIN CHEN:

Malfacila ekflugo de la ĉina civila aviado



NUNTEMPE aertransporto ludas gravan rolon en la tuta socio. En evoluintaj landoj aviadiloj fariĝas ĉefa transportilo por longdistanca trafiko. Kompare kun ili la civila aviado de Ĉinio estas multe postĝinta. En Ĉinio troviĝas nur 140 flughavenoj por civilaj aviadiloj. Ĉinio havas 200 komercajn aviadilojn kun ekfluga ŝarĝkapablo de pli ol 9 tunoj. En 1992 la totala jara aertransportokvanto de Ĉinio estis malpli ol tiu de Singapuro. Baiyun-flughaveno en la urbo Kantono estas la plej granda civila flughaveno en Ĉinio, ĝia jara en-kaj elaviadiliĝa kvanto estis 7 milionoj da homoj kaj jara kvanto de aviadilaj en-kaj elflugo estis 60 000 fojoj, kiuj egalas dekonon de tiu de flughaveno de Ĉikago, Usono. Hongqiao-flughaveno en Ŝanhajo estas la plej granda flughaveno de vartransportado. Ĝia jara en-kaj elaviadiliĝa kvanto estas nur 150 000 tunoj. Oni diris, ke la civila aviado de Ĉinio

havas pezajn flugilojn. Nun fariĝis pli klara la kontraŭdiro inter la postĝinteco de ĉina aviado kaj la rapida disvolviĝo de la ĉina ekonomio.

En la pasintaj jaroj oni eĉ pruntis monon por lui kaj aĉeti aviadilojn, tiel ke la nombro de la civilaj aviadiloj atingis 667 kaj 300 el ili estas pasaĝeraj. En 1992 la jara aertransportokvanto pliiĝis je 32% kompare kun tiu en 1991, kaj la jara aertransporta pasaĝeraro pliiĝis je 30%. Je la fino de 1992, la aerlinioj de la civila aviado de Ĉinio nombris 500, 66.7% el ili estis nove malfermitaj de post 1978. En la lastaj 14 jaroj la civila aviado de Ĉinio disvolviĝis 3.4-oble pli rapide ol la meznombra rapideco de la monda civila aviado. Nun Ĉinio okupis la 12-an lokon en la mondo tiukampe, sed en 1978 ĝi okupis la 37-an lokon.

Tamen la fundamentaj ekipaĵoj de la civila aviado de Ĉinio estas nefortaj. Eksterlande la civilaj aviadoj ĝenerale aplikas la duagradan blindan surterigon.

Oni povas surterigi aviadilojn, kiam la nubo super la flughaveno estas pli ol 30 metrojn alta kaj la videbleco de la kurejo estas en 400 metroj malproksime. En Ĉinio en neniu flughaveno oni povas tion fari kaj nur en 18 flughavenoj oni aplikas la unuagradan blindan surterigon (kondiĉe, ke nubo estas 60 metrojn alta kaj videbleco en 800 metroj). Se altiĝus la grado de blinda surterigo, plisekuriĝus la aviadado kaj malpliĝus la prokrastiĝo de aviadiloj pro malbonaj veteroj. Necesas 20 000 000 juanoj por starigi la duagradan sistemon en la Pekina Ĉefurba Flughaveno. La sumo ja ne estas tro granda, tamen por tio oni devas kompletigi ankaŭ aliajn instalaĵojn, kiaj telekomunikado, pilotado, radaro kaj meteobservado. La totala projekto bezonas 190 000 000 juanojn. Tio ja estas granda sumo.

Oriente de Pekino situas urbo Dalian, kie estas vicaerodromo de la Pekina Ĉefurba Flughaveno. La aviadila haltejo povas enteni nur 8 aviadilojn. Decembre,

1992, Pekinon kovris densa nebulo. Pasageraj aviadiloj surterigis en la Dalian-a Flughaveno, kies haltejo ne povis enteni tiom multe da aviadiloj, tial iuj devigite staris sur kurejo. Estis nur 20 laborantoj en la flughaveno, kompreneble por bone prizorgi la 1 000 neatendatajn pasagerojn ili ne kapablis, kvankam ili penadis, oferis ĉion, kion ili havis, inkl. de siaj propraj manteloj kaj litaĵoj. Poste iuj pasageroj ilin kritikis. Ili vere suferis maljustan trakton.

La postgiginta instalaĵo malhelpas la disvolviĝon de la aviadaj aferoj de Ĉinio, dum manko de pilotoj restas pli serioza problemo. La civila aviado de Ĉinio havas 3 000 pilotojn kaj nur 1/3 el ili povas gvidi aviadon kaj funkcii kiel ĉefpiloto. En la civila aviado de Ĉinio funkcias 13 000 aviadilaj laborantoj. Ĉiu aviadilo posedas averaĝe nur 20 personojn. En Ĉinio multaj aviadistoj estas supersargitaj per laboro, pro tio iuj trolacigitaj, antaŭtempe emeritiĝas. La Ĉina Civila Avia- da Administracio (ĈCAA) konas la seriozecon de la problemo kaj trovis la solvon. Tamen por trejni aviadistojn oni bezonas ne nur

tempon, sed ankaŭ monon. La ununura aviada lernejo en Ĉinio ĉiujare povas elkulturi 150 aviadistojn, dume la civila aviado de nia lando bezonas 300.

La situacio estas ja serioza por nia aviado. Oficisto de ĈCAA diris, ke la rapide disvolviĝanta ekonomio defias la postgigintan civilan aviadon kaj ke oni devas pene labori, tiel ke la nuna situacio pliboniĝos nur post 3-5 jaroj. Ĝi faras ĉion eblan por ke en 2000 la jara aertransporta kvanto de la ĉina civila aviado enviciĝas inter la unuaj 10 lokoj de la mondo.

ĈCAA ĉiam metas sekurecon en la unuan lokon. Ĉar preskaŭ ĉiuj aviadaj akcidentoj okazas pro neserioza administrado, nealta normo kaj nestrikta administrado. ĈCAA ofte faras esploron pri la problemoj koncernantaj aviadon sekuron kaj okazigas aktivadon "Sekura Jaro '93", por ke ĉiuj laborantoj de ĈCAA oferu sian forton por garantiĝi la jaran sekurecon.

Por disvolvi la civilan aviadon oni devas pliigi aviadilojn, rapidigi la konstruon de kompletigaj


instalaĵoj. ĈCAA starigas fonduson, prunteprenas monon, kolektas monon de provincoj kaj kunlaboras kun alilandaj entreprenoj. Ili planas en 5 jaroj plibonigi 40 flughavenojn inkl. tiujn de la provincaj ĉefurboj, gravaj urboj kaj turismaj lokoj. Sur 20 plej grandaj flughavenoj povos ekflugi kaj surterigi aviadiloj kun 200-400 sidlokoj, dum sur aliaj povos ekflugi kaj surterigi aviadiloj kun 150-200 sidlokoj. Je la fino de la 20-a jarcento, oni metos sub aŭtomatan radaran regadon la centran kaj orientan regionojn de Ĉinio. La ĉefaj internaciaj flughavenoj kaj enlandaj gravaj flughavenoj kun komplika meteo aplikos la duagradan blindan surterigon, dum aliaj flughavenoj aplikos almenaŭ la unuagradan. Tiel estos garantiataj la sekureco kaj ĝusteco de la aviadado.

ĈCAA opinias, ke la lokaj aviadaj kompanioj iagrade mildigos la streĉitecon de la ĉina aviado kaj devas esti protektataj kaj bone prizorgataj, tamen oni devas reteni la tendencon blinde komenci entreprenon. Krome, ĈCAA luas eksterlandajn aviadilojn, permesas eksterlandanojn starigi aviadon kompanion kaj konstrui flughavenon en Ĉinio kaj konsultas alilandajn aviadajn fakulojn pri aviada administro.

ĈCAA pliigos sian investon por la aviada instituto. Ili pliigos nombron de la studentoj, konstruos trejnajn centrojn por aviadistoj kaj aviadaj servistoj, por ke ili ricevu normalan trejnadon. Oni trejnos ankaŭ aliajn personojn, kiaj aviadilaj konservistoj kaj riparistoj.

La potencoĝo de la ĉina ekonomio ne disiĝos de la aviadaj aferoj, kvankam la aviadaj aferoj nun ankoraŭ estas iom postgigitaj, tamen ni kredas, ke en la proksima estonteco ili certe pli rapide disvolviĝos. ■

Aviadiloj "Yun 7" produktitaj de la Xi'an-a Aviadila Kompanio



Pri reformado al la ĉina financa sistemo

de WU CHUNHUA

EN la 30 jaroj post sia fondiĝo, la nova Ĉinio efektivigis planizitan ekonomian sistemon, responde al ĝi la banko praktikis la sistemon de "ŝtataj monopolaj depono kaj kredito, ŝtataj monopolaj enspezoj kaj elspezoj". Tiu sistemo ludis pozitivan rolon en la ĉina ekonomia konstruado, precipe en la 50-aj jaroj ĝi kolektis kapitalojn por ĉefaj konstruoj, kio fundamentis la ekonomian disvolviĝon de Ĉinio. Kun la tempopaso oftigis komplikaj ekonomiaj aktivadoj. Per sola planizita ekonomio estis malfacile atingebla la plej bona arango de la sociaj riĉfontoj.

Fine de la 70-aj jaroj Ĉinio ekpraktikis reforman kaj pordmalferman politikon, la komercaĵa ekonomio havis rapidan disvolviĝon, kio premis reformadon al la ĉina financa sistemo. Post dekelk-jara esplorado kaj praktikado, la ĉina financo ekludis pli kaj pli grandan reguligan rolon en la nacia ekonomio. Ĝi montriĝis ĉefe en la jenaj kampoj:

Financo jam fariĝis grava makroreguliga rimedo por la ŝtato. Laŭ la ĝenerala kredita plano de la ŝtato la banko praktikas planizitan administradon al la ĉefaj financaj normoj, kiaj kredita skalo kaj emisio kvanto de monbiletoj. En kreditado la banko rigore plenumas la ŝtatan politikon pri industrioj kaj kreditajn principojn. Ekz. por akceli kontinuan

kaj rapidan kreskon de la ekonomio kaj preventi seriozan inflacion pro ĝia trorapida kresko, ĉijare la Centra Banko praktikas stabilan kreditan monsystemon kun iom da streĉiteco, fortigas kaj plibonigas la planizitan administradon de kredita sumo al diversaj fakaj bankoj, perfektigas kontrolan sistemon pri emisio kaj borskvoto de la obligacioj kaj akcioj.

La banko jam fariĝis ĉefa kanalo de financado kaj asignado por konstruado de nia lando. La banko povas ne nur per diversaj rimedoj kolekti deponaĵojn por pliigi fontojn de kredita fonduso, sed ankaŭ funkcii kiel agento, kiu reemisas ŝtatajn kaj entreprenajn obligaciojn, akciojn k.a. por kolekti grandegan monsumon por la ĉina ekonomia konstruado.

Dank' al la multspecaj kreditaj formoj kaj instrumentoj, la banko unuapaŝe malfermis la financan merkaton. Kun disvolviĝo de la banka kredito, ankaŭ komerca kaj konsuma kreditoj disvolviĝis en malsamaj gradoj. Iuj grandaj kaj mezgrandaj urboj provfunkciigis kreditan aferon. La Ĉina Internacia Trusta kaj Investa Korporacio en Pekino estas la unua kredita entrepreno en Ĉinio por kolekti kaj utiligi fremdlandajn kapitalojn. Nun en Ĉinio funkcias dekoj da tiaj entreprenoj. En 1987 la korporacio fondis landskalan sintezan bankon — Zhongxin-a Entreprena Banko, kiu ĉefe administras deponadon kaj kreditadon de

la ĉinaj kaj fremdaj valutoj, faras kreditan, agentan, garantian, konsultigan, konservan kaj asekuran servojn. Post plurjara penado la banko jam starigis agentajn rilatojn kun 350 bankoj de pli ol 50 landoj kaj regionoj kaj fondis siajn branĉojn en Ŝanhajo, Shenzen, Nankino kaj Qingdao (Ĉingdaŭ).

Krome, la financa entrepreno faris unuajn provojn en reformado al administrado de kreditaj kapitaloj, senĉese reguligas interesan strukturon laŭ la ŝtataj industriaj politikoj kaj profitoj de la entreprenoj, kaj tiel interezoj bone ludas sian reguligan rolon. Por adaptiĝi al la bezono de la merkata ekonomio, multaj fakaj bankoj memvole reguligis sian administran strategion. Ili kreditas la entreprenojn laŭ la vendado de ties produktaĵoj, t.e. ili pli multe kreditas tiujn, kies produktaĵoj havas grandan debiton sur la merkato, kaj malmulte kreditas tiujn, kies produktaĵoj malfacile vendiĝas, Ekz. la Ŝtalfenestra Fabriko de Jinzhou (Ĝingou), Liaoning-provinco, havis seriozan debiton en la pasintaj kelkaj jaroj, en 1991 la fabriko decidis produkti energiŝparan duoble-vitran fenestron, patentitan de la ŝtato. La Jinzhou-a branĉo de la provinca Trafika Banko, post enketaĵo, opiniis, ke la produktaĵo estas perspektivoplena kaj kreditis la fabrikon per la ekipaĵ-reforma kaj cirkula kapitaloj, kio revivigis

la fabrikon. En la sama jaro la fabriko profitis 500 000 juanojn.

La reformado al la financa sistemo akiris iujn sukcesojn kiel la supre menciitajn, tamen kun la profundigo de la nacia ekonomia reformado, precipe post kiam Ĉinio starigis al si la taskon fondi socialisman merkatan ekonomian sistemon, la financa afero alfrontas pli altan kaj pli novan postulojn.

S-ro Zhou Zhengqing (Ĝou Ĝengĉing), vicdirektoro de la Ĉina Popola Banko, lastatempe montris, ke la financa reformado celas starigi makroreguligan sistemon, kiu, kun nerekta reguligo kiel la ĉefa, liveras monsumon laŭ la bezono de la merkato, kaj financan sistemon dispoziciantan kapitalojn laŭ la ekonomia profito. Estas longa distanco inter la financaj entreprenoj kaj la celo. Ekz. en sia administrado kaj disvolvigo la banko posedas kaj amasigas tro multe da mono, malrapide cirkuligas ĝin kaj havas malbonan profiton, fakaj bankoj nelerte respondas al la makroreguligo de la centra banko ktp. Pro tio, financistoj ĝenerale opinias, ke en la venonta merkata ekonomio la banko devas iri entreprenigan administran vojon, kio estas nepra tendenco por profundigi la reformadon al la financa sistemo.

En Ĉinio nun jam formiĝis nova financa sistemo kun la centra banko kiel la gvidanto, la ŝtataj bankoj kiel la ĉefa parto kaj diversaj financaj institucioj en kuna ekzistado. Unu el la celoj por fondi tiun sistemon estas pere de la Centra Banko sinteze uzi diversajn makroreguligajn rimedojn por influi la cirkulan koston de kapitaloj de diversaj fakaj bankoj. La celo povos efektiviĝi, nur kiam diversfakaj bankoj vere fariĝos entreprenoj, nur tiam ili povos zorgi pri sia cirkula profito, havi konscion pri la eblaj danĝeroj, vere respondi pri profito kaj perdo. ■

Sentencoj de eminentaj

ĉinoj

Ripetadu lernitajn sciojn de tempo al tempo.

de KONFUCEO

Ju pli multe mi legas, des pli lerte mi verkas.

de DU FU

Progresi paŝo post paŝo, ripete kaj detale legi — jen ĝusta metodo de lernado

de ZHU XI

Studu skribitajn librojn kaj konu neskribitajn rezonojn.

de LU SHANJI

En juneco oni ne lernas, en maljuneco oni malĝojas.

de YUE FEI

Oni sukcesas en nenio sen firma volo.

de ZHANG ZAI

La malamiko de studo estas memkontento. Por vere ion lerni oni devas unue liberigi sin de memkontento.

de MAO ZEDONG

Homo legas kaj vivigas senvivan libron.

de GUO MORUO

Legado, same kiel ekspluato de mino, "lavas oron el sablo".

de ZHAO SHULI

Senmorta arto venas el modesteco, senŝanceliĝo kaj ardeco.

de MAO DUN

Scienco respektas fakton. Al teorio ne aldonu absurdan motivon.

de LI SIGUANG

AMUZOJ

Humuraĵoj

I

Patrino demandis sian filon, kiu la unuan tagon vizitis lernejon kaj ĵus hejmen revenis: "Kion la instruistino instruis al vi hodiaŭ?" La filo respondis: "Nenion. Male, ŝi demandis min, kiom estas unu kaj du. Kaj mi instruis ŝin, ke estas tri."

II

Patrino kaj filo promenadis sur avenuo. Subite elsaltis granda hundo kaj bojadis kontraŭ ili. La filo ege timis

kaj kaŝis sin malantaŭ sian patron.

"Ne timu, mia kara! Ĉu vi ne scias la proverbon, ke bojanta hundo ne mordas?" diris la patro.

"Jes, mi scias, tamen ĉu la hundo scias ĝin?"

III

Iun tagon, reveninte hejmen de la lernejo, knabo diris al sia patrino: "Hodiaŭ nur mi respondis la demandon de la instruisto."

La patrino demandis: "Tre bone, sed kiu demando?"

Li respondis: "Kiu rompita la fenestron de la klasĉambro?"

IV

Iu kliento demandis fungovendiston: "Kiel distingi venenajn fungojn disde la ordinaraj?"

La vendisto respondis: "Mangiinte ilin, vi scias."

Novaj virinoj (Karikaturaj)





Budhisma aktivado en Xiangguo-temple de Kaifeng, Henan-provinco

HISTORIA MISTERO

Kiam budhismo enkondukiĝis en Ĉinion?

de SHI PING

KRISTANISMO, budhismo kaj islamo estas tri ĉefaj religioj en la mondo. Kristanismo naskiĝis en Okcidento, islamo en la araba regiono kaj budhismo en Oriento.

Budhismo naskiĝis en Hindio en la 6-a jc. a.K. kaj post 1 800 jaroj, t.e. en la 12-a jc. en Hindio ĝi tute kadukiĝis, sed en tiu periodo ĝi enkondukiĝis en Ĉinion, iom post iom furoris tra la tuta Ĉinio kaj fariĝis grava parto de la ĉina kulturo. Precipe post kiam budhismo kadukiĝis en Hindio, Ĉinio fariĝis ĝia dua hejmloko kaj bazloko de mahajano. De tie la hana budhismo enkondukiĝis en Japanion kaj Koreion kaj la tibeta budhismo en Mongolion kaj Sovetunion.

GRAVA INFLUO DE BUDHISMO SUR ĈINION

Kiel ekzota kulturo, budhismo donis ekstreme grandan influon al Ĉinio. Politike ĝi estis ĉiam subtenata de imperiestroj. Imperiestroj kaj iliaj edzinoj de diversaj dinastioj plejparte kredis je budhismo kaj iuj el ili eĉ bonz(in)iĝis. En la akademia kampo, dank' al sia longatempa disvolviĝo, ĝi fariĝis aparta fako kaj unu el la tri plej fortaj religioj en Ĉinio (la aliaj estas konfuceanismo kaj taoismo). En Ĉinio multaj popularaj vortoj kaj proverboj portas budhismajn kolorojn. Ĝi estas aparte rimarkinda en la okuloj de la ordinaraĵ ĉinoj. En Ĉinio ĝi havis vastan amason da kredantoj. La budhismaj aktivadoj, kiaj la festo de la 8-a de la 12-a monato kaj templa kermeso jam fariĝis ĉina moro. La multegaj budhismaj temploj, turoj, statuoj

kaj ŝtonaj skulptaĵoj beligis la ĉinan teron kaj fariĝis valoraj kulturaj heredaĵoj de la ĉina nacio. Dank' al budhismo, la pikturo, muziko, kaligrafio, arkitekturo, tekstilado k.a. havis grandan disvolviĝon. Budhismo faris gravan influon ankaŭ sur astronomion, medicinon, ĉigong-on kaj aliajn sciencojn en Ĉinio.

Oni povas diri, ke en sia disvastiĝo budhismo estis iom post iom ĉinigitaj, dum multaj objektoj de Ĉinio ekportis budhismajn kolorojn.

PRI BUDHISMA ENKONDUKIĜO EN ĈINION

En la komenco post sia enkondukiĝo en Ĉinion, budhismo sin kroĉis al superstiĉoj kaj ne estis multe atentata de la socio, kaj tiam nur malgranda parto de la regantaro kredis je ĝi. Budhismo multe disvastiĝis nur en la Nordaj kaj Sudaj Dinastioj (220-589). Tiam populariĝis ankaŭ la ĉina taoismo, naskiĝinta en la Orienta Han-dinastio (25-220). Iuj taoistoj kaj budhistoj pli kaj pli akre konkuris en ĉasado de famo kaj profito. Ili beligis sin kaj kalumniis unu la alian. En la ĉina historio estis plurfoja disputado inter ili. En la Okcidenta Jin-dinastio (256-317) taoisto Wang Fu falsis sutron "Laozi Disĉiplinis Alilandanojn", kiu diras, ke la taoisma fondinto Laozi venis en Hindion kaj iniciis Ŝakjamunion, fondinton de budhimso. Sed budhistoj refutis tion. La disputo daŭris ĝis Tang-dinastio (618-907).

Tiam aperis pluraj influhavaj asertoj pri budhisma enkondukiĝo en Ĉinion:

A. Budhismo naskiĝis antaŭ 3 aŭ 4 jarmiloj.

En Song-dinastio (420-479, kiam regis imperiestroj Liu) kaj Tang-dinastio oni konsultis "Hai Nei Jing", ĉapitron el la klasika ĉina verko "Shan Hai Jing", kaj opiniis, ke antaŭ trimil jaroj en Ĉinio oni jam konis budhismon, tamen fakuloj opiniis, ke kvankam "Shan Hai Jing" estas klasika verko, tamen la ĉapitro "Hai Nei Jing" estis falsita de posteulo. Kvankam oni ne konis ekzakte la datojn de la naskiĝo kaj forpaso de Ŝakjamunio, sed la diversaj onidiroj diferencis nur en 100-200 jaroj, la ĝenerala opinio estas, ke Ŝakjamunio vivis en la 6-a jc. a.K. Pro tio la historiistoj malaprobis tiun opinionon.

B. Budhismo enkondukiĝis en Ĉinion en Zhou-dinastio.

Ĉinaj bonzoj konsultis la antikvan libron "Zhou-shu Yiji" kaj opiniis, ke en 977 a.K. kiam regis reĝo Zhao de Zhou-dinastio (la 11-a jc. — 256 a.K.) naskiĝis Ŝakjamunio. Tiam ĉinoj sciis jam ke naskiĝis en la okcidento sanktulo, kio pruvis, ke budhismo jam enkondukiĝis en Ĉinion. Iuj citis el la antikva libro "Liezi", ke "en la okcidento jam naskiĝis sanktulo" kaj asertis, ke en Zhou-dinastio jam estis budhismo en nia lando. Oni opiniis ĝenerale, ke la du menciitaj libroj estis verkitaj ne en Zhou-dinastio, sed pli malfrue, tial tiuj opinioj ne estas akceptitaj de la fakuloj.

C. Konfuceo sciis budhismon.

En Tang-dinastio oni trovis, ke en la artikolo pri Konfuceo (551-479 a.K.) el la antikva verko "Liezi" legiĝas, ke Konfuceo tiam jam sciis, ke sanktulo naskiĝis en la okcidento, pro tio oni asertis, ke Konfuceo jam sciis budhismon.

Ĉu la "sanktulo" menciita de Konfuceo estas Ŝakjamunio? Tio ja vekis disputon siatempe, kaj plie la verko fakte estis multe malfrua, tial tiu aserto estis malprobata.

Ĉ. Antaŭ Qin-dinastio en Ĉinio estis Asoka-templo.

En la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj oni verkis, ke laŭ sugesto de iu dia bonzo de la okcidento, la reĝo Shi Hu (295-349) de la Posta Zhao-regno malkovris ruinon de la Asoka-templo en la urbo Linzi kaj tie trovis budhan relikvon en arĝenta skatolo en ŝtona kesto, de tio oni supozis, ke antaŭ Qin-dinastio en Ĉinio jam estis budhismo.

Asoka estis hinda reĝo, kiu protektis kaj disvolvis budhismon. Li estis ĉiam estimata de la ĉinaj budhistoj. Sed la malkovrita tombo eble estis ordinara ĉina konstruaĵo kaj la arĝenta skatolo povus esti entombigita kune kun la mortinto. Pri tio fakuloj ne donis jesan konkludon.

D. Alilandaj bonzoj venis en Ĉinion en Qin-dinastio.

En Tang-dinastio oni skribis en sia verko, ke kiam regis la Unua Imperiestro (221-209 a.K. sur trono) de Qin-dinastio, venis de eksterlande 18 bonzoj kun sutroj por budhanigi la imperiestron, kiu tamen rifuzis kaj malliberigis la bonzojn. Nokte dio savis ilin. Ĉar

Asoka kaj la Unua Imperiestro de Qin-dinastio vivis en la sama tempo kaj plie Asoka iam sendis 256 bonzojn alilanden, eble iuj el ili venis en Ĉinion. Ja estis la ebleco, ke en Qin-dinastio budhismo enkondukiĝis en Ĉinion, sed ĝi malaperis pro forbruligo de la libroj kaj masakro de la konfuceanoj far la Unua Imperiestro de Qin-dinastio. Pri tiu aserto, iuj aprobis, dum la plejparto dubis aŭ neis.

E. La imperiestro Wudi de la Okcidenta Han-dinastio sciis budhismon.

Tiu aserto baziĝas ĉefe sur tri verkoj: I. En la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj aperis la libro "Ming Fo Lun", kie legiĝas interparolo inter la imperiestro Wudi de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 25 p.K.) kaj literaturisto Dongfang Shuo pri budhismo. II. En la historia libro "Wei-dinastio" legiĝas, ke delegito de Han-dinastio, s-ro Zhang Qian, informiĝis pri budhismo, kiam li oficvojaĝis al la okcidento. III. En pluraj libroj legiĝis, ke la imperiestro Wudi de Han-dinastio kultis la hunan "Oran Homon". Li kultis ne per buĉitaj bovo kaj ŝafo, sed nur per incensado kaj riverencado. Fakuloj neas ankaŭ la tri supre menciitajn argumentojn.

F. Ĉina katalogisto Liu Xiang trovis budhismajn sutrojn.

Antikva libro notis, ke s-ro Liu Xiang (77-6 a.K.), la plej frua katalogisto de Ĉinio, trovis budhismajn sutrojn, kiam li reviziis librojn. Antikvaj budhistoj aprobis tiun tezon, sed modernaj fakuloj dubas pri ĝi, ĉar oni trovis neniun vorton pri budhismaj sutroj en la verko "Qi Lue", verkita de Liu Xin, filo de Liu Xiang.

KONKLUDO

La supre diritaj opinioj estis kreditaj de multaj bonzoj en la historio, sed post esplorado laŭ diversaj materialoj la fakuloj ne povas konstati, ke ili estas veraj. Kiam do budhismo enkondukiĝis en Ĉinion? Ĝenerala opinio de fakuloj estas, ke ĝi enkondukiĝis en Ĉinion en la lastaj jaroj de la Okcidenta Han-dinastio aŭ en la komencaj jaroj de la Orienta Han-dinastio. Imperiestro Mingdi de la Orienta Han-dinastio iam sendis delegiton al la okcidento por peti budhismajn sutrojn. Tio estis komenco de la budhismaj aferoj en nia lando.

Pluraj historiaj materialoj notis, ke iutage imperiestro Mingdi vidis en la sonĝo altastaturan "oran homon" kun sunlumo malantaŭ si. Post sia vekiĝo la imperiestro demandis siajn korteganojn. Iu el ili respondis, ke en la okcidento naskiĝis dio, nomata Budho, kiu estas altastatura kun ora vizaĝo kaj ke la imperiestro vidis en la sonĝo la Budhon. Pro tio imperiestro sendis al Hindio por peti budhismajn sutrojn kaj sekve budhismo enkondukiĝis en Ĉinion.

Tiu aserto estis notita en la historiaj verkoj. Pro tio ĝi estas plej fidinda, tamen oni opinias, ke antaŭ tio en nia lando certe jam aktivadis budhismo, sed oni ne povas konstati, en kiu jaro ĝi enkondukiĝis en Ĉinion. ■

WANG HANPING:

Intervjuo al Sabira



F-ino Sabira (maldekstre) en kunsido

SABIRA, juna finna esperantistino, plurfoje vizitis Ĉinion kaj estas konata de multaj ĉinaj esperantistoj. En novembro 1992, kiel reprezentanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ŝi partoprenis en la 18-a Kolektiva Konsulto de Neregistaraj Junularaj Organizoj

okazinta en Pekino. Tiun kunvenon aranĝis la Ĉina Junulara Federacio komisiite de Unesko. Matene, antaŭ la fermo de la kunveno, ŝi prelegis por junaj pekinaj esperantistoj. Profitante tiun okazon, mi intervjuis ŝin.

Wang: Mi konis vin, leginte vian artikolon "Impresoj dum Vojaĝo en Ĉinio" en nia revuo.

Bonvolu iom rakonti pri vi kaj Ĉinio.

Sabira: Mi konis Ĉinion pere de Esperanto. En 1986 mi havis la unuan renkontigon kun Ĉinio, tiam mi tute ne sciis pri Ĉinio. Mi venis al la 71-a UK kaj restis en Pekino du semajnojn. En la rapida kurso de la kongreso mi lernis la ĉinan lingvon, tamen mi pensis, ke ĝi estas malfacila, ke mi neniam studos ĝin, kaj ke ĉi fojo estas la unua kaj eble la lasta por mi en Ĉinio. En 1987 mi finis lernejon kaj pensis, kion mi studu. Mi vidis, ke en la Helsinka Universitato estas nova fakto, kiu nomigas Orientaziaj Studoj. Mi pensis, ke tiu eble estus interesa, eble mi povus okupiĝi pri la japana lingvo. Mi ekstudis kaj pensis, ke mi iĝos lingvisto kun specialigo de la japana lingvo. Post du monatoj mi komprenis, ke estas tamen ne. Ĉar lingvistiko estas tro teoria kaj mi ŝatas okupiĝi pri homoj kaj kulturoj kaj simile. Mi konstatis, ke la ĉina lingvo estas pli interesa. Mi ŝanĝis komplete mian opinion. Post 7 monatoj da lernado de la ĉina lingvo mi iris al Ĉinio por vojaĝi kaj lerni la ĉinan lingvon. Mi restis en Ĉinio 4 monatojn kaj studis en la Pekina Lingva Instituto. Tiam mi komencis paroli la ĉinan. Poste mi revenis al Finnlando kun firma decido, ke en la venonta jaro mi revenos. En 1989 mi triafoje venis al Ĉinio, poste ankaŭ al Taiwan. Nun mi studas en la Azi-afrika Fakultato de la Helsinka Universitato (ŝi jam diplomiĝis el tiu universitato kaj nun estas doktoriganto en Bonn — *La Red.*). La venontan jaron mi venos al Pekino por studi pri lingvoj kaj kulturoj de ĉinaj nacimalplimulto.

Wang: Vi plurfoje venis al Ĉinio, vizitis multajn lokojn kaj renkontis multajn ĉinajn esperantistojn. Kian impreson vi havas pri junaj ĉinaj esperantistoj?

Sabira: Mi konis multajn junajn ĉinajn esperantistojn. Mi pensis, ke

ili estas tre kapablaj. Jes, mi scias, ke ilia Esperanto-nivelo ne estas tiom alta, sed rigardante la kondiĉojn, en kiuj ili laboras, mi devas vere admiri. Ĉar la kondiĉoj ne estas bonaj kaj okazoj de Esperanta praktikado ne estas multaj, tamen multaj junuloj persistas en sia lernado de Esperanto. Ili nun eble ankoraŭ ne havas spertojn, tamen post iom da laboro ili havos spertojn.

Wang: En Ĉinio troviĝas centmiloj da esperantistoj, multaj el ili estas junuloj. Jam en 1950 fondiĝis la Ĉina Esperanto-Ligo, tamen ankoraŭ ne estas Esperanta organizo por junuloj, tio ne kunordiĝas kun la stato, ke en Ĉinio estas multego da junaj esperantistoj. (La Ĉina Junulara Esperanto-Asocio fondiĝis en marto 1993 — *La Red.*)

Sabira: En Ĉinio multaj junuloj eklernis Esperanton, tamen multaj forlasis. Ĉar ili ne vidas la utilon de Esperanto. Iuj el ili neniam legis Esperantan gazeton, neniam aŭskultis Esperantajn radio-elsendojn, neniam renkontis eksterlandajn esperantistojn. Mi pensas, ke E-asocio por junuloj povas helpi en la situacio.

En UK ĉiam estis sufiĉe da ĉinoj, sed en junularaj kongresoj apenaŭ. Mi pensas, ke nun venas tempo por ŝanĝi la staton. La juna ĉina esperantistaro devas plikonaktiĝi kun TEJO kaj aliaj asocioj, kiuj konsistigas TEJO-n. De la estonta ĉina junulara E-asocio ricevos amason da informoj, gazetoj kaj invitoj de aktivecoj. Tio signifas, ke la landa asocio estas membro de la tutmonda komunumo. Se estas ne tia asocio, TEJO kaj aliaj E-asocioj ne bone kontaktiĝos kun junaj ĉinaj esperantistoj, kiuj sendube perdos multajn ŝancojn.

TEJO povas helpi al Ĉinio starigi la ĉinan junularan E-asociion.

Ĉinio preparas, kaj espereble en marto 1993 la asocio fondiĝos. Tiam Ĉinio povas peti inviti la internacian junularan kongreson.

Wang: Ĉu vi scias pri Esperantaj aktivecoj de aliaj aziaj landoj kaj regionoj?

Sabira: Mi vizitis multajn aziajn landojn. Japanio kaj Koreio havas multajn esperantistojn, la historioj de E-movado de la du landoj estas longaj. La esperantistoj en Nepalo, Vjetnamio, Pakistano kaj Irano estas viglaj, kaj la E-movado bone fartas. En Singapuro, Malajzio, Indonezio, Kamboĝo, Mongolio kaj Aŭmen troviĝas esperantistoj, kiuj starigis asociojn aŭ klubojn, funkciigis E-kursojn kaj eĉ eldonas E-gazetojn. La E-movado en Tajlando, Hongkong kaj Taiwan ne bone fartas.

Wang: Vi studas jam en universitato kaj havas multajn Esperantajn travivaĵojn. Kiel vi komencis lerni Esperanton?

Sabira: Mi eklernis Esperanton en 1984, iom kiel ŝerco. Iutage mia patrino revenis kun libro de librovendejo, hazarde tiu estas Esperanta lernolibro, kaj la tuta familio komencis lerni. Post unu jaro ni iomete ŝerce uzis Esperanton, uzis kelkajn vortojn, tamen ne serioze okupiĝis. Poste mi vidis, ke estas aliaj esperantistoj en la mondo, ni iris al renkontiĝoj. Mi iris al jarkunveno de la Finlanda Esperantista Junulara Organizo, kie mi estis hazarde elektita kiel vicprezidanto, kaj poste prezidanto. En 1989 mi instruis Esperanton en Taiwan unu jaron. En julio 1991 mi estis elektita kiel vicprezidanto de TEJO.

Wang: TEJO estas internacia organizo por junaj esperantistoj de la tuta mondo, tamen ankoraŭ multaj ne konas ĝin. Ĉu vi bonvolus koncize prezenti tiun organizon?

Sabira: Kvankam iuj junaj esperantistoj ankoraŭ ne scias, ke estas TEJO, tamen ĝi prezentas junajn esperantistojn de la tuta mondo. Ĝi estas por ĉiuj malpli-ol-30-jaraj homoj, sed ankaŭ por pli-ol-30-jaraj homoj, kiuj pagas kaj subtenas ĝin. Ĝi havas individuajn membrojn kaj asociajn aligitajn membrojn. Ĝi havas momente 36 aligitajn junularajn asociojn. Ekde la venonta jaro ĝi eble havos 40.

TEJO eldonas dumonatan gazeton "Kontakto", kiu temas ne pri movado, sed pri diversaj junularaj aferoj kaj prezentas facilajn artikolojn. "Kontakto" estas por junularo kaj por komencantoj kaj progresantoj de Esperanto. Se oni estas membro de TEJO, se oni subtenas aŭ kolektive abonas ĝin, oni povas ricevi ĝin. Krome TEJO ĉiujare eldonas "Pasportan Servon", kiu estas adresaro kun pli ol 900 adresoj de esperantistoj en diversaj lokoj de la mondo. Tiuj adresoj estas enlistigitaj, ke oni povu skribi aŭ telefoni al tiu aŭ alia por peti helpon aŭ tranokton. Tial oni diras, ke "Pasporta Servo" estas eĉ foje pli utila ol pasporto.

TEJO organizas ĉiujare Internacian Junularan Kongreson, kiu okazis en Montrealo de Kanado ĉi-jare, en 1993 kaj 1994 okazos respektive en Bulgario kaj Koreio. Por junuloj, kiuj venos al kongreso, estas bone iri al junulara kongreso. Mi mem estis unuafoje en mia vivo en junulara kongreso. TEJO estas tutmonda, kvankam eble foje ĝi aspektas eŭropa pro tio, ke la sidejo estas en Eŭropo kaj multaj aktivuloj estas en Eŭropo, ni volonte havus en la estraro TEJO azianojn, afrikanojn kaj amerikanojn, sed ĝis nun ankoraŭ ne estas kandidatoj.

La slogano de TEJO estas "Loko por vi en TEJO".

Wang: Dankon!

Eksperimento en Slavjansko

de MIKAELO POPOV (Ukrainio)

EN 1912 la franca gazeto "Excelsior" organizis tradukkonkurson inter Esperanto kaj naciaj lingvoj. Al ses tradukistoj, invitataj en ĉambron, oni disdonis neeldonitan francan li-

teraturan tekston kaj proponis traduki ĝin en ses bone posedatajn de ili lingvojn — angla, germana, hispana, itala, rusa kaj Esperanta. Post la tradukado oni foririgis la tradukistojn el la ĉambro, invitis ses aliajn tradukistojn kaj propon-

is traduki la tekston inverse en la francan. Post tio organizintoj de la konkurso kodigis la tradukaĵojn kaj transdonis ilin al juĝantaro, konsistanta el tri bonaj literaturistoj francaj. Laŭ ilia juĝo la retraduko per-Esperanta estis la plej ĝusta.

Okdek jarojn post tiu konkurso en Ukrainio okazis simila konkurso inter Esperanto kaj la angla.

En la urbo Slavjansko de Donecka regiono de Ukrainio en la Internacia Instituto de Administrado (IIA) estis efektivigita eksperimento kun mirinda rezulto. En la komenco de la lernojaro 1992, laŭ ordono de rektoro de la instituto profesoro Poddubnij F.I., estis formitaj du grupoj da studentoj de la unua klaso po 300 personoj. En la unuan grupon estis selektitaj studentoj, en kies abi-

SUR NIA LIBROBRETO

Aventuroj de rikiŝisto

de RICHARD CASH



Kamelo Ŝjangzi (1936). Laŭ Ŝe. El la ĉina trad. Ŭang Ĉongfang. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988, 319 p. 21 cm. Bind. Kun mapo kaj ilustraĵoj. 18.00 gld.

Laŭ Ŝe (1899-1966) estis konata ĉina verkisto. Li aktive partoprenis la Rezist-militon inter 1937 kaj 1945, kaj post la fondiĝo de la Popola Respubliko li plenumis plurajn postenojn kaj ĝuis multajn honorojn sur la literatura kampo. Li pereis dum la Kultura Revolucio.

Kiel ĉiuj liaj romanoj kaj dramoj, lia ĉefverko el la 30-aj jaroj, *Kamelo Ŝjangzi* havas tre socikritikan karakteron. Ĝi elmontras la malfacilan vivon de la ĉina popolo — kamparanoj kaj ankaŭ urbanoj — substrekante la socian maljustecon regantan tiun socion. Lia tezromano estas socia fresko pro sia detala prezentado de la tiamaj ĉinaj socio kaj kutimaro. Per kelkaj vortoj ni komprenas la pezan laboron de rikiŝisto kaj la malfacilaĵojn, kiujn li alfrontas pro indiferenteco de ĉirkaŭaj homoj kaj pro koruptado en la politikaj sferoj. Unua gvidmotivo de la romano estas la nobleco de tiu, kiu vendas sian forton por vivrimedoj. Ni memoru,

turiantaj diplomoj estas altaj poentoj pri la angla lingvo, en la duan — kun ajnaj poentoj. Estis proponite organizi ekspresajn kursojn: en la unua grupo — de la angla lingvo, en la dua — de Esperanto. (Ambaŭ lingvoj en la instituto estas devigaj objektoj) Estis starigita la tasko prepari koncerton en la respektiva lingvo.

La grupoj ne estis en la samaj kondiĉoj: “angloj” jam lernis la lingvon 6-7 jarojn, “esperantistoj” komencis de nulo, kaj multaj el ili la unuan fojon aŭdis la vorton “Esperanto”. Malgraŭ tio instruistoj de Esperanto akceptis la defion kaj komencis paroligi studentojn. La studentoj okupiĝis ĉiutage ok horojn, dum la lernado estis preparata la koncerta programo. Esperanton instruis sep instruistoj, perfekte posedantaj la lingvon kaj

metodikon de ĝia instruado. Inter ili estis prezidanto de la Ukraina Esperanto-Asocio Cibulevskij D.M. kaj ĝia vicprezidanto Ŝilo G.M. La instruistoj, kiuj gvidis la ekspresan kurson de Esperanto, formas en IIA katedron de Esperanto — la duan en la historion de Esperanto-movado (la unua Esperanto-katedro estis malfermita en 1966 en Budapeŝta universitato).

En la kvina tago la studentoj ekparoladis en Esperanto. Unu semajnon post la komenco de la ekspresa kurso estis prezentita koncerto en Esperanto, kiu daŭris du horojn. Estis kantoj, deklamoj, spektakloj, fabloj, anekdotoj kaj ŝercoj. Mi spektis la koncerton, kaj estis forte impresita! De la infanaĝo mi parolas en Esperanto (la patro — esperantisto) kaj

scias, ke ĝi estas facila, sed mi ne supozis, ke dum nur unu semajno de la lernado eblas prepari tian scenan spektaklon.

Spektinte la koncerton, instruistoj de la angla lingvo malĝojigis kaj petis permeson daŭrigi ilian ekspresan kurson. Ĝi daŭris ankoraŭ tri semajnojn, post kio la studentoj prezentis koncerton en la angla lingvo. Ĝi okupis nur 20 minutojn, kaj dum konsiderinda parto de tiu tempo studento ludis trumpeton, kio certe ne estas spektaklo en la angla lingvo.

La eksperimento farita en Slavjansko montris sendubajn avantaĝojn de Esperanto kompare kun la angla, kaj la iniciatinto de la eksperimento F. I. Poddubnij por ĉiam enskribis sin en la historion de Esperanto-movado. ■

ke kvankam Laŭ Ŝe estis profesoro, do privilegiito en tiu epoko, li naskiĝis en malriĉa medio. Dua gvidmotivo: unuopulo estas malforta, sed grandaj homgrupoj nerezisteb-laj.

Mi preskaŭ nomus la romanon felietona, pro la multaj aventuraj okazaĵoj, kie unu post alia venas plej kruelaj sortobatoj, interpunktita de momentoj de intensa feliĉo. Mankas neniu elemento de melodramo, eĉ ne senintenca gravediĝo.

Ŝjangzi estas kamparano, kiu volas “sukcesi en la vivo” kaj esti propra mastro. Ne tre inteligenta, sed dotita de forta volo — kaj de forta dorso —, li iras al la urbo por trovi taŭgan laboron. Li fariĝas rikiŝisto, unu el la plej penigaj laboroj, kiujn oni povas imagi. Li havas nur unu revon: perlabori sufiĉe por akiri propran rikiŝon. Sed aĉetinte ĝin, li preskaŭ tuj perdas ĝin pro la civila milito (ĉ. 1930). Tiam li “trovas” kamelon — kaj pro tio li poste nomiĝas “Kamelo” Ŝjangzi. Cetere, kamelo sufiĉe bone karakterizas Ŝjangzi-on: silentema, pacienciga, penemega.

Ni do sekvas liajn vivon kaj evo-

luon, ekde junaĝa espero ĝis kompleta degenero. Tiu ĉi estas interesa kaj pensiga romano, kiu komprenigas al ni kulturan relativecon.

Moroj de ĉinaj nacimulplimultoj

de J. CAUBEL

En Ĉinio vivas miliardo da hanoj kaj preskaŭ cent milionoj da homoj el 55 naciecoj. La plej malgranda havas 6 000 anojn kaj la plej granda 15 milionojn. La morojn de 20 naciecoj traktas tiu libro.

Ofte belaj legendoj klarigas la sencon de la festoj: Foje proksimiĝis du montoj, ĝis eksonis tondro kaj eliris viro kun virino, kiuj geedziĝis... Foje brava junulo sagpafis monstron, kiu forkaptis saĝan vilaĝaninon. Foje du gefratoj rajdis sur la du finoj de ligna fosto ĝis la ĉielo, por konvinki la sunon kaj la lunon, ke ili aranĝu sian aperon kaj malaperon...

La naciecoj havas kelkfoje nur parolatan propran lingvon; kelkaj estis nomadaj; ĉiuj sentas kul-ton al la prapatroj. La festoj sekvas lunan

kalendaron. Multaj ŝatas dancon kaj kantadon. La festaj vestoj kaj ornamaĵoj estas buntaj kaj belegaj. Kelkfoje okazas batalo ĉu inter bubaloj, ĉu inter rajdantoj.

Jen diversaj manieroj por montri korinklinon: per antifonado, t.e. kantado kun repliko; per fazanplumo sur muzikilo; per nazfluto; per ĵeto de silkfadena pilko...

La libro priskribas la disvolviĝon de la festoj, detalas la manĝaĵojn kaj iliajn receptojn (ekz. la pistita moĉio).

Tiu broŝurita libro entenas 105 paĝojn de formato 12 × 18.5 cm. Dek kvin koloraj fotoj montras la buntecon de la festoj. La verko estas skribita en bonegaj lingvo kaj stilo. Komprenoble multaj vortoj estas malfacilaj: nomoj de kreskaĵoj, bestoj... Sed tamen la libro taŭgas por infanoj aŭ junuloj, eĉ por ĉiu publiko. Ĝi dezirigas la leganton vojaĝi al Ĉinio.

Eldonita de Ĉina Esperanto-Eldonejo, P.O. Kesto 77, Beijing. Ĉinio 100037.

El “Sennaciulo”

Pri nia dekkvintaga restado en Gresillon

de JEAN kaj PAULETTE BALACEY

NI aŭdis pri la Kultura Esperanto-Domo en Gresillon, kaj ni deziris iri tien, por progresi en la scio de la internacia lingvo.

Kiam oni lernas nur perletere, oni sentas la bezonon paroli kun aliaj samideanoj; la interparolado estas nepre necesa.

Do, ni enskribiĝis por restadi en la kastelo dum la lastaj du semajnoj de junio. Kaj ni povas aserti, ke ni ne bedaŭras tion!

Ni forlasis nian urbon Dijon, transiris dufoje la riveron Loire kaj alvenis en la ĉarman urbeton Baugé. En ĝi ni vidis la kastelon de la reĝo René (Duko de Anjou). Leginte montraĵojn, ni veturis sur la Zamenhof-Strato, ĉe unu ekstremaĵo de la urbo; post du kilometroj ni atingis la Kulturalan Esperanto-Domon, t.e. elegantan kastelon meze de parko.

Ĉiam kun plezuro ni renkontas esperantistojn. Ni retrovis kelkajn personojn, kiujn ni jam vidis en fervojistaj kunvenoj. Ni ankaŭ konatiĝis kun aliaj homoj: angloj, italoj, germanoj... kaj francoj, kompreneble.

Dum la junia periodo okazis du kursoj: la unua por la komencantoj, la dua por la praktikantoj. Ni elektis la duan.

Kvar simpatiaj anglianoj studis kun ni kaj ĝojigis ĉiujn ĉestantojn. Nia instruistino estis tre kompetenta kaj humura. La kurso komenciĝis per kanzono.

Sendube tiu studtempo estis tre profita por ni.

Inter la matena kurso kaj tiu, kiu okazis je la fino de la posttagmezo, ni trovis tempon por promeni. Ni vizitis la ĉirkaŭan regionon. Ni vidis ĝian kamparon kaj ĝiajn monumentojn, interalie la kastelon de Langeais kaj la Abatejon de Fontevrault. Ni admiris noktan spektaklon en la parko de la kastelo "Le Lude".

Tamen ni neniam neglektis niajn taskojn. Ni akurate laboris.

Paroladoj, projekcioj de dia-

pozitivoj pri la kongreso en Ĉinio kaj kantoj okupis niajn vesperojn. Niaj anglaj amikinoj ĥore kantis kaj provis lernigi al ni siajn Esperantajn kantojn.

Ni devas laŭdi la akcepton de s-ro kaj s-ino Pierre Babin kaj ankaŭ la afablecon de ĉiuj, kiuj partoprenis en la staĝo.

Ni konservas tre agrablan memoron pri tiu restado kaj ne forgesos la dimanĉon pasigitan kun la grupo de Le Mans.

Nia deziro estas reiri, venontan jaron, al Gresillon. ■

ABONTARIFO DE EPC

Lando	Valuto	1 Jaro	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	18.70	16.00	34.70
Aŭstrio	ATS	192	128	320
Belgio	BEF	575.00	375.00	950.00
Germanio	DEM	27.30	18.20	45.50
Britio	GBP	9.20	6.30	15.50
Finnlando	FIM	61.40	49.60	111.00
Francio	FRF	88.00	62.00	150.00
Italio	ITL	20200	13800	34000
Nederlando	NLG	27.50	23.50	51.00
Nov-Zelando	NZD	25.60	22.00	47.60
Svisio	CHF	23.00	16.50	39.50
Usono	USD	14.00	12.00	26.00
Kanado	CAD	16.80	14.40	31.20
Japanio	JPY			4140
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	14.00	12.00	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko, Latin-Ameriko, Orient-Eŭropo kaj Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj:				
	USD			14.40

ESP-NOVAĴOJ

Ni bonvenigas Esperantajn artikolojn, Esp-novaĵojn kaj fotojn de ĉiu ajn Esperanta organizo aŭ individuo. Bonvolu sendi kontribuojn al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

● S-ro Na Beyngdo de Seulo komencis unujaran vojaĝon tra Azio, Afriko kaj Eŭropo, tuj post kiam li diplomitiĝis el altlernejo. Ĉinio estas la unua stacio de lia vojaĝo. En pli ol 40 tagoj li vizitis Tianjin (Tjanĝin), Zaozhuang (Zaŭg-



S-ro Na Beyngdo en Tianjin

ŭang), Fuyang, Xi'an (Ŝji'an), Yanji (Janĝji) kaj Pekinon, kie lin bonvenigis lokaj esperantistoj. La 28-an de majo li adiaŭtis Pekinon kaj vojaĝis tra Nanning al Vjetnamio.

● Ekde la 25-a de aprilo la Esperanto-Klubo de Shenyang, Liaoning-provinco, havas Esperantan angulon en la hejmo de geedzoj John Macleod kaj Hadie

Macleod, kiuj instruas en la Shenyang-a Financa kaj Ekonomika Instituto. La geedzoj estas aŭstraliaj esperantistoj. Ili petis aliĝi al la Ĉina Esperanto-Ligo kaj fariĝis ununuraj alilandaj membroj de ĈEL.

● En unu kaj duona jaroj de sia ekzisto, la Esperantista Unesko-asocio Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo vastigis sian agadon al ĉiuj kontinentoj. La 6-an kaj 7-an de marto 1993 la Konsilantaro de Monda Kunagado kunsidis kun pluraj aktivuloj en Berlino. Oni konstatis firman bazon de la asocio: ĉ. 300 membroj en pli ol 40 landoj, sufiĉaj enspezoj por kovri la bazajn servojn, kaj kreskanta reto de perantoj kaj aktivuloj. La revuo Monda Forumo aperas kvarfoje jare kaj traktas plej diversajn internaciajn temojn.

Monda Kunagado okazigos praktikan seminarion pri "trejnado kontraŭ rasismo" en la aŭtuno de 1993. Pliaj detaloj pri aranĝoj de Monda Kunagado troviĝas en la revuo Monda Forumo. Por provekzempleron skribu al Ulrich Becker, Plauener Str. 39, D-0-1092 Berlin, Germanio.

● En la regiono de Chemnitz (iama Karl-Marx-Stadt) funkcias la firmao "Falcom Gmbit", kies

laborlingvoj estas Esperanto kaj la germana kaj angla lingvoj. La firmao nun serĉas partnerojn en la tuta mondo por importo kaj eksporto de servico kaj aliaj varoj. Adreso: Falcom Gmbit, S-ro Christian Papenmeier, Obere Hauptstrasse 104, D-0-9156 Qelsnitz/E, Germanio.

La Red.

● La 23-an de marto estis inaŭgurita ekspozicio pri la Oficiala Antaŭkongreso en la sidejo de "CONEX". En la inaŭguro estis prezentitaj du afiŝoj de la 78-a UK kaj kolekto da afiŝoj de la Antaŭkongreso, afiŝoj de la pasintaj universalaj kaj internaciaj kongresoj, centoj da poŝtmarkoj, poŝtkartoj, libroj, revuoj kaj insignoj. Dum la ekspozicio s-ro S. Aragaj, prezidanto de la Organiza Komitato de la Antaŭkongreso, kore dankis la E-asociojn pro ties helpo kaj kunlaboro.

● La 31-an de marto okazis prezentado de videofilmo de s-ro Josep Ivern pri la pasinta 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao (Ĉingdaŭ), Ĉinio, kaj unu leciono de la televida kurso de Esperanto organizita en Sabadell. Post la prezentado la televidantoj aplaudis kaj dankis s-ron Josep Ivern pro lia reprezentado de Hispanio en Qingdao.

● Komuna kongreso de Germana Esperanto-Asocio kaj Ĉeĥia Esperanto-Asocio okazis dum la 28-a kaj 31-a de majo 1993 en la banloka urbo Karlovy Vary. Loka poŝtoŝtanco en Strážnice uzadis afrankmaŝinstampon kun teksto "Komuna kongreso de ĈEA-GEA 28-31.5.93".

● La 14-an de februaro 1993 la urbestro de Otavo Jacquelin Holzamen proklamis la Dekan Semajnon de Internacia Amikeco en Otavo, kiu okazis de la 21-a ĝis la 27-a de februaro. En sia proklamo la urbestro instigis la civitanaron serĉi informojn pri Esperanto ĉe la Urba Biblioteko de Otavo, la bibliotekaro de Algonken-Kolegio kaj la bibliotekaro de Kolegi-Civito.

En la ekspozicio pri la Oficiala Antaŭkongreso de la 78-a UK



Akvoellasa ceremonio ĉe Dujiangyan


Fotoj de LI CHUNGENG

Dujiangyan, ĉe la supra Minjiang(Minĝjang)-rivero okcidente de Guanxian-(Gŭanŝjan)-gubernio de Sichuan-provinco, estas antikva irigacia konstruaĵo fama en kaj ekster Ĉinio.



La torenta fluo de la rivero multe damaĝis la lokon. Antaŭ 2 000 jaroj prefekto Li Bing kun sia filo kaj lokanoj konstruis digojn, fendis monton kaj faris kanalon por forkonduki superakvon en ebenaĵon. La konstruaĵo protektis la lokon kaj vasta kamparo estis irigaciata dum la postaj pli ol 2 000 jaroj.

La akvoellasa ceremonio komenciĝis en la antikveco. Poste ĝi evoluis en regulan tradician kultadon. La ceremonio disvolvis la nacian kulturon, esprimis la volon de la popolo venki la naturon kaj montris iliajn estimon kaj karmemoron al Li Bing kaj lia filo.

Antaŭ akvoellaso



La antikva akvo-
reguliga konstrua-
jo Dujiangyan



Akvoellaso

Prefekto en antikva
kostumo deklaranta la cere-
monion malfermita



Verdigo en centra Ĉinio

Teksto de ZHAI HONGWU

Fotoj de LI HUATANG

LA provinco Henan situas en centra Ĉinio kaj estis fama pro seriozaj inundo, sablovento, teralkaliĝo kaj malbona ekologia medio en la ĉina historio. Post multjara verdigo, en 1992, 94 ebenaĵaj kaj duonebenaĵaj gubernioj, kiuj konsistigas 55.7% de la totala areo de la provinco, atingis la verdigan normon difinitan de la Forstokultura Ministerio de Ĉinio. En la ebenaĵa regiono de la provinco kreskas 590 000 hektaroj da forstoj, kiuj konsistigas 14.4% de la tuta regiono, kaj la kvanto de la vivanta ligno estas 48 milionoj da kubmetroj. Tial, la provinco fariĝis unu el la ĉinaj provincoj, kie la verdigita areo estas plej granda kaj efiko de verdigo plej rimarkinda.

En Henan-provinco ĉe la meza baseno de la Flava Rivero, troviĝas la antikvaj ĉefurboj Anyang, Kaifeng kaj Luoyang kaj multaj historiaj restaĵoj.

Tamen, pro multfoja translokiĝo de la riverujo de la Flava Rivero kaj breĉiĝo de ĝia digo kaj multfoja inundo de Huaihe-rivero trafluanta la sudorientan parton de la provinco, en la ebenaĵa regiono de orienta kaj norda provinco aperis 15 milionoj da muoj (15 muoj = 1 hektaro) da sabla tero kaj 5 milionoj da muoj da alkala tero. Je la fino de la 50-aj jaroj, en la ebenaĵa regiono de la provinco kreskis 150 milionoj da arboj kaj nur 1.5% de la tero estis kovritaj de arboj, tiel ke la ekologia medio malboniĝis kaj naturaj katastrofoj oftigiĝis.

Por ŝanĝi la malbonan medion, Henan-provinco prenis ebenaĵan verdigon, reguligon de tero kaj bonigon de la ekologiaj kondiĉoj kiel gravajn aferojn. La diversnivelaĵoj registaroj de la provinco organizis la kamparanojn por batali kontraŭ sablo. En la antaŭa riverujo de la Flava Rivero en la orienta parto de la provinco, oni kulturis 5 grandajn kampoŝirmajn forstojn, kiuj protektis 8 milionojn da muoj da kampoj. Post tio, la lokaj kamparanoj plantis salikojn sur sabla tero kaj paŭlovniojn sur alkalaj kampoj. En la 70-aj jaroj, en la ebenaĵa regiono oni alprenis la metodon


planti paŭlovniojn sur kampoj, kulturis kampoŝirmajn forstojn kaj kreskigi arbojn ĉe vilaĝoj, loĝdomoj, vojoj kaj riverbordoj. Menciindas precipe, ke post la grandskala kulturado de kampoŝirmaj forstoj en la lastaj jaroj, fine de 1991, 70 milionoj da muoj da kampoj havis siajn arboretojn. Oni kulturis forstojn kun areo de 3.35 milionoj da muoj kaj plantis 1.36 miliardojn da arboj ĉe vilaĝoj, loĝdomoj, vojoj kaj riverbordoj. Krome, oni ankaŭ rekulturis la kampoŝirmajn forstojn en la antaŭa riverujo de la Flava Rivero en la orienta parto de la provinco, kun longo de pli ol 500 kilometroj kaj areo de 700 000 muoj, nove kulturis kampoŝirmajn forstojn en la antaŭa riverujo de la Flava Rivero en la norda parto de la provinco, kun longo de 424 kilometroj kaj areo de 600 000 muoj, kaj la Junularajn Kampoŝirmajn Forstojn ĉe la Flava Rivero, kun longo de 72.5 kilometroj kaj areo de 1.45 milionoj da muoj, kaj verdigis 210 000 vilaĝojn, 140 000 kilometrojn da fervojoj kaj ŝoseoj kaj riverbordojn. Nun en la ebenaĵa kaj duonebenaĵa regionoj la procento de arbokovrita tero estas pli alta je 4.4% ol la normo difinita de la Forstokultura Ministerio de Ĉinio.

La disvolviĝo de la ebenaĵa verdigo rimarkinde plibonigis la kondiĉojn de agrikultura produktado kaj pligrandigis la povon rezisti kontraŭ naturaj katastrofoj. Sciencistoj kaj teknikistoj longtempe observis en la ebenaĵa regiono kaj konstatis, ke la relativa humideco de la kampoj ŝirmitaj de arboj pliiĝis je 20%. La plej alta kaj la plej malalta temperaturo malaltiĝis kaj altiĝis je 1°C respektive, kio povas pliigi produktokvanton de greno je ĉ. 20%. Post la verdigo, la antaŭa riverujo kaj la inunda regiono de la Flava Rivero fariĝis gravaj agrikulturaj regionoj. Antaŭ 1980, en la gubernioj Xihua (Ŝjihŭa), Fugou kaj Yanling en la inunda regiono de la Flava Rivero, la mua produktokvanto de greno ne atingis 150 kilogramojn, tamen en 1992 la mua produktokvanto de greno de la gubernioj atingis 270, 314 kaj 286 kilogramojn respektive kaj la gubernioj fariĝis bazaj produktoj de paŭlovnioj, fruktoj, greno, kotono kaj viando de Henan-provinco.

La disvolviĝo de la ebenaĵa verdigo ege riĉigis la fontojn de ligno. Antaŭe mankis ligno al la provinco. Plejparto de la lignaj materialoj uzitaj de la provinco estis transportita el aliaj provincoj. Nun, en la ebenaĵa regiono de la provinco la kvanto de la vivanta ligno jam atingis 34.24 milionojn da kubmetroj kaj konsistigas 37.4% de la totala kvanto de ligno en la provinco. Ĉiujare kreskas 7.88 milionoj da kubmetroj da ligno, kiuj konsistigas 50% de la kvanto de la kreskinta ligno en la provinco, kaj superis la kvanton de la montregiono. Ĉiujare produktiĝas pli ol 4 milionoj da kubmetroj da ligno, kiuj konsistigas pli ol 50% de la ligna produktokvanto de la provinco. La subprovincoj Zhoukou (Ĝoukoŭ) kaj Shangqiu (Ŝangĉiŭ) ĉiujare liveras pli ol 800 000 kubmetrojn da ligno. La gubernio Fugou ĉiujare produktas 100 000 kubmetrojn da ligno kaj liveras 30 000-40 000 kubmetrojn al aliaj lokoj. Nun funkcias pli ol 600 lignaj merkatoj kaj ĉiam pli kaj pli vigliĝas la komercado pri ligno en la ebenaĵa regiono de la provinco. La kresko de la ligna rezervokvanto en la ebenaĵa regiono ne nur utilas por protekti la arbarajn fontojn en la montregiono, sed ankaŭ preparis novan vojon por havigi lignon al la provinco per si mem.

La disvolviĝo de la ebenaĵa verdigo multe helpis solvi la malfacilojn pri livero de ligna materialo, brutonutraĵo, hejtaĵo kaj sterko. Antaŭe, pro malfacila trafiko kaj ekonomia malriĉeco, al la lokaj kamparanoj mankis hejtaĵo. Ili uzis ĉefe plantotigojn kiel hejtaĵon por manĝo-preparo kaj varmigo. Dank' al la disvolviĝo de la ebenaĵa verdigo, en plejparto de la gubernioj la kamparanoj uzas arbobranĉojn kiel hejtaĵon dum 3-4 monatoj jare. Tio ne nur havigis energion al la ebenaĵa agrikultura regiono, sed ankaŭ donis kondiĉon por disvol-

Riĉa rikolto de jujuboj



vi bruto-bredadon. En la gubernio Minquan (Minĉŭan), situanta en la antaŭa riverujo de la Flava Rivero en la orienta parto de la provinco, ĉiujare oni kolektas pli ol 200 milionojn da kilogramoj da arbofolioj kaj 100 milionojn da kilogramoj da soforfloroj kaj per ili nutras pli ol 150 000 ŝafojn. En la gubernio Weishi ĉiujare oni faras 3 milionojn da kubmetroj da sterko el arbofolioj.

La disvolviĝo de la ebenaĵa verdigo reguligas la agrikulturan strukturon, larĝigas la vojon por disvolvi produktadon kaj plimultigas la enspezon de la kamparanoj. Antaŭe, la kamparanoj produktis ĉefe grenon, tial estis malmulta la enspezo de la kamparanoj. Post la disvolviĝo de la forstokulturado, senĉese multiĝis la enspezo de la kamparanoj el vendo de lignaj materialoj kaj produktaĵoj de ekonomia forsto. Samtempe la disvolviĝo de la ebenaĵa verdigo havigas materialojn al la prilabora industrio. Nekompleta statistiko diras, ke en la vilaĝoj, subdistriktoj kaj gubernioj de la ebenaĵa regiono de la provinco funkcias ĉ. 1 000 entreprenoj por prilabori lignon kaj produktaĵojn de ekonomia forsto. Ili fabrikas ĉ. centon da produktaĵoj, kiaj ligna peco, meblaro, tabulo por elektra aparato, muzikilo, artaĵo, konfitaĵo, ladfrukto kaj trinkaĵo. Uruŝiaj tabuloj produktitaj en la provinco estas vendataj en Japanio kaj aliaj landoj. Muzikiloj fabrikitaj en la Muzikila Fabriko de Lankao el bonkvalita uruŝia ligno jam havas grandan debiton sur la internacia merkato. Nun la nombro de ebenaĵaj gubernioj, ĉiu kun jara enspezo de pli ol 10 milionoj da juanoj el vendado de ligno, jam superis 40. De 1981 ĝis 1990, la gubernio Shanshui, kie facile okazas superakvo, enspezis 410 milionojn da juanoj el forsto-kulturo. En la subdistriktoj Baotun de Fugou, 120 kamparanaj familioj fariĝis riĉaj familioj kun almenaŭ dekmi- lo da juanoj, dank' al vendado de lignaj materialoj kaj kulturado de arbidoj.

La disvolviĝo de la ebenaĵa verdigo rimarkinde plibonigis la naturan fizionomion kaj ekologian medion de la ebenaĵa agrikultura regiono. En la ebenaĵa verdigo oni plene utiligas la tempan, regionan kaj spacan diferencojn inter agrikulturaj plantoj kaj arboj dum ilia kreskado por plejeble disvolvi la latentajn fortojn de lumo, varmo, akvo kaj tero kaj formi sintezan ekologian sistemon de agrikulturo kaj forsto-kulturo. Per tio oni ne nur plibonigis la ekologian medion, sed ankaŭ kreis kondiĉon grandkvante kaj stabile pliprodukti grenon.

En la lastaj jaroj la forsto-kulturaj grupoj el pli ol 50 landoj kaj regionoj vizitis la provincon. Vizage al prosperantaj kampoj en arboretoj, fakuloj laŭdis, ke tio estas nova vojo kreita de Ĉinio por disvolvi forsto-kulturon. ■



Kampoŝirmaj forstoj en Qixian-gubernio, Henan

Foto de QI BAOYUAN

Forstoj laŭlonge de vojo





Riĉa rikolto sur kampo ŝirmita de arboj



Abelobredado en arbaro



Antikvaj ĉefurboj de Ĉinio

de GUAN LI

KAIFENG, Luoyang kaj Xi'an (Ŝji'an) estas la plej famaj antikvaj urboj multe ŝatataj de turistoj. Hodiaŭ mi konigu al vi dektagan itineron, kaj laŭ tiu linio vi povos viziti tiujn antikvajn urbojn de malsamaj gustoj.

La itinero komenciĝas de Pekino. Kredeble la unua vido pri Pekino bone impresos vin. Vi restos en Pekino 4 tagojn por viziti la Grandan Muron, Imperiestran Palacon kaj plurajn famajn vidindejojn. Poste vi flugos al Zhengzhou (Ĝengĝoŭ), kaj de tie vi veturos per aŭto al Kaifeng.

Kaifeng estis unu el la ses antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Vi vizitos la urbon en unu tago.

La plej fama antikva konstruaĵo en Kaifeng estas la Budhisma Templo Xiangguo (Ŝjanggŭo). Antaŭ ĉirkaŭ 2 200 jaroj tie estis domo de iu princo. Poste oni konstruis sur la loko templon. La templo estis rekonstruita en la postaj dinastioj. La nuna templo estis rekonstruita en 1766. En la templo estas Sutra Konservejo kaj Mahavira Halo. La interkruciĝantaj konzoloj, la flavaj kaj ver-

daj glazuritaj tegoloj kaj la balustradoj el blanka ŝtono ĉirkaŭ la halo faras la konstruaĵojn pli imponaj. Sub la tegmentrandoj tintas sonoriletoj. En la halo sidas ligna statuo de Avalokitesvaro kun mil brakoj kaj mil okuloj. La ortegita statuo altas 7 metrojn. En la kampanilo de la templo estas sonorilego muldita antaŭ centoj da jaroj. La sonorilego altas 4 metrojn kaj pezas 5 000 kilogramojn.

La dua vidindaĵo en Kaifeng estas Fera Pagodo en Youguo (Joŭgŭo)-templo. La pagodo estis konstruita en 1049. La brune kahelita okangula pagodo aspektas kvazaŭ muldita el fero, tial oni nomas ĝin Fera Pagodo. Malgraŭ tertremo kaj inundo en la pasintaj 900 jaroj, la pagodo restas sendifekta. Sur la supra etaĝo oni povas havi panoramon de la antikva urbo. Krome sur la kaheloj estis gravuritaj dioj, budhoj, animaloj, vegetaloj kaj homoj.

En la sekvanta tago vi veturos per aŭto al alia antikva urbo Luoyang. En la urbo vi vidos budhajn kavernojn Longmen, unu el la plej brilaj kulturaj trezorejoj de Ĉinio.

La budhaj kavernoj viciĝas

ambaŭflanke de Yihe-rivero, 13 kilometrojn sude de la urbo. La fosado de la kavernoj estis komencita en 494 p.K. kaj daŭris pli ol 400 jarojn. Oni konstruis sume 2 100 kavernojn kun cent mil budhaj statuoj kaj pli ol 40 budhaj pagodoj. Vi vizitos kelke da famaj kavernoj, kiel Guyang, Binyang, Lianhua kaj Wanfo, kaj la Templon por Sutro-legado. La kaverno Guyang estis plej frue fosita kaj enhavoriĉa. La kaverno Binyang enhavas grandajn reliefojn pri budhismaj rakontoj. En Lianhua-kaverno estas statuo de Gotamo alta je 5 metroj, kaj sur la plafono estas grandega lotusfloro. En Wanfo-kaverno estas 15 mil budhaj statuoj.

La Templo de Blanka Ĉevalo en Luoyang estas vizitinda loko. La templo situas oriente de la urbo kaj havas la historion de ĉirkaŭ dumil jaroj. Ĝi estis la unua budhisma templo, post kiam budhismo konatiĝis en Ĉinio. Laŭ onidiro, du ĉinoj pilgrimis al Hindio por peti sutrojn. Survoje ili renkontis du eminentajn bonzojn venintajn de Hindio. Ili reportis la sutrojn per blanka ĉevalo kaj konservis ilin en Luoyang. Poste oni konstruis templon kaj nomis ĝin Templo de Blanka Ĉevalo. Tie estas la tomboj de la du bonzoj. En la templo estas pluraj grandaj haloj kaj multaj valoraj steleoj kun skribaĵoj. Pro la bona geografia situo la templo estas bela en ĉiuj sezonoj.

Post vizito en Luoyang vi trajne veturos kelke da horoj por iri al Xi'an. Tie vi restos du tagojn por viziti antikvan pagodon Dayan, la Muzeon de Terakota Legio de la Unua Imperiestro de Qin(Ĉin)-dinastio (221 a.K. — 206 a.K.). De Xi'an vi veturos al Ŝanhajo por de tie flugi hejmlanden.

Mi esperas, ke la itinero, kiu kunligas multajn antikvajn ĉefurbojn, de tempo al tempo donos al vi ĝojon kaj surpriziĝon. ■

CHEN SI:

Ĉinaj “Sistinaj Freskoj”

JE mencio de la Sistinan Katedralon de Italio oni nature rememoras Mikel-Angelon, grandan italan majstron de la Renesanco kaj lian gigantan pentraĵon “Genezo” sur plafono, kiun oni gloris same kiel la religion mem. En Ĉinio estas ankaŭ sanktejo simila al la Sistina Katedralo, t.e. Fahai-templo, kie la 500-jaraj freskoj daŭre vekas admiron de la vizitantoj pro siaj elstara pentrarto kaj brilaj koloroj.

Fahai-templo, konstruigita de eŭnuko de Yingzong-imperiestro de Ming-dinastio (1368-1644), sidas ĉe montpiedo nordokcidente de Pekino. Oni kolektis siatempe la plej elstarajn pentristojn kaj metiartistojn en la 5-jara konstruado de tiu ĉi imperiestra templo. Kun areo de ĉ. unu kvadrata kilometro, la grandioza templo konsistis el Haloj de Mahavira, Sanghârâma, Kvar Ĉielaj Reĝoj,

Dharmapala kaj Konservejo de Budhismaj Sutroj k.a. Sur la muroj de tiuj konstruaĵoj estis belaj freskoj, sed pro milita detruo restas freskoj nur en la Halo de Mahavira.

La freskoj de tiu halo troviĝas dorse de la budha niĉo, sur flankaj muroj de la halo kaj ambaŭflanke de ĝia malantaŭa pordo. Ili ĉefe temas pri Budho kaj Budhismaj rakontoj. La fresko ambaŭflanke de la malantaŭa pordo longas je 11 m kaj altas je 3.2 m. Per liberaj linioj kaj en densaj koloroj desegniĝis 35 Budhismaj figuroj, 3-ope aŭ 5-ope aktivantaj, kun gracia mieno kaj en luk-saj vestoj kun ornamoj. Ekz., Indro estas la plej potenca ĉiela dio de la Sud-Azia Subkontinento. Legendo diras, ke li, tute bruna, povas transformiĝi, venigi tondron kaj pluvon, estis tiel forta, ke li povas dishaki montojn kaj konduki riverojn. Li estas an-

kaŭ dio de milito. En ĉinigitaj temploj oni pentris lin kiel junan monarkon, sed ĉi tie kiel belan kaj teneran virinon. Sur la pentraĵo la Okcidentĉiela Reĝo, unu el la 4 gigantoj en Budhismo, kun malbela mieno kaj en kiraso, tenante drakon en la manoj, aspektas kiel generalo partoprenonta en batalo.

La plej brila el la freskoj de la halo estas tri bodisatvoj en grandeco de 4.5m×4.5m dorse de la niĉo, t.e. Avalokitesvaro, Manjusro kaj Samantabhadro. Avalokitesvaro staras en la mezo. Ŝi, duonnuda, estas tiel elvokiva, ke oni povas senti la delikatecon de ŝia delikata, elasta haŭto kaj ĝui ŝian belecon. Precipe la gazo sur ŝia korpo impresas kiel ŝvebanta nubo kaj nebulo. La leono apud Manjusro estis pentrita per ora pulvoro, kaj la hararo klare videblas kiel oraj pingloj. Oni liberstile skizis la blankan elefanton de Samantabhadro, kiu aspektas moviĝante.

La freskoj de Fahai-templo distingiĝas per tio, ke la pentristoj, ne sekvante la tradician manieron, naturstile faris kaj homfigurojn kaj florojn kaj bestojn. Sur la freskoj viglas entute 77 homfiguroj, inter ili estas gemaljunuloj kaj gejunuloj, budhoj kaj monstroj... iuj el ili klarigas Budhismon, aliaj faras meditadon, triaj pie sidas sur genuoj, kvaraj malrapide marŝas kaj ankaŭ iuj lante flugas... Kiam oni atenteme rigardas ilin proksime, oni trovas, ke iuj virinoj havas supraĵajn palpebrojn kun faldo kaj la aliaj tute ne. Se la pentristoj ne long-

Fahai-templo



tempe kaj zorgeme observus la realajn objektojn, ili ne povus tiel precize kaj vivece fari ilin. En la templo la freskoj plejparte estas delikatliniaj kaj nur malgrandparte liberstilaj, kiuj ambaŭ estas perfekte faritaj. Ekz., por pentri figuron 160 m altan, oni liberstile skizis la robon ĉ. 80 cm longajn kaj desegnis per delikataj linioj manikojn ĉe mallarĝaj partoj. La koloroj estas ankoraŭ tre helaj hodiaŭ.

Ming-dinastio estis konsiderita kiel periodo, en kiu Ĉinio povus suriri sur kapitalisman vojon. Tiam la komerco kaj metiindustrio prospere floris en urboj. Furoris la urbana kulturo strebanta al vulgara distriĝo. Ĝuste en tia kultura medio naskiĝis la Budhaj freskoj de Fahai-templo similaj al pentraĵoj pri popola vivo. Oni opiniis, ke la figuroj de la freskoj similas al tiuj de Tang-dinastio (618-907) kaj la pentristoj heredis la stilon de fama pentristo Wu Daozi de Tang-dinastio. Farante freskojn de Fahai-templo, oni penadis surmurigi la realan vivon de la tiamaj civitanoj. Kiuj estis la farintoj de tiuj freskoj? Tiu demando restas ankoraŭ ne solvita hodiaŭ.



Feino



Ĉiela Reĝo



Bodisatvoj

Vizito al la Fantoma Urbo

CE Yangzi-rivero, la plej granda en Ĉinio, staras la malgranda gubernia urbo Fengdu. Ĉina legendo diras, ke ĝi estas la ĉefurbo de fantoma mondo, kiun regas dio de infero. Laŭ la legendo, la animoj de mortintoj devas tien veni por sin anonci, kaj la urbeto fariĝis restadejo de fantomoj. En la tria tago de la tria monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas Festo de Fantomo. Ĉi-printempe, vojaĝante en Sichuan-provinco, mi spertis la feston en Fengdu.

Je la komenco de la homa civilizacio miskompreno pri mirindaj fenomenoj naturaj kaj fiziologiaj naskis ĉe homoj timon, adoron kaj kredon al fantomo kaj dio. Certe tio ombris la korojn de posteuloj. Same kiel la aliaj antikvaj nacioj, la ĉina nacio kun civilizacio de kvin jarmiloj havas siajn proprajn konceptojn pri spiritoj sistemigitajn per legendoj. En Fengdu, mondo de fantomoj, oni povas koni la naskiĝon kaj disvolviĝon de la konceptoj kaj detale studi ilin.

Starante sur la movoplenaj stratoj de Fengdu mi ne trovis la urbon diferenca de la aliaj. Fakte, la supre menciita Fantoma Urbo ne situas en ĝi, sed nordoriente de ĝi, sur Mingshan-monto ĉe Yangzi-rivero. Maljuna lokano diris al mi, ke en la Fantoma Urbo estas multaj vizitantoj tage, sen ombro de fantomo. Nur post sunsubiro terura atmosfero regas sur la monto. Do de antikve neniu tranoktas surmonte. Tuj post vesperigo oni ŝlosas la pordegon ĉe la montpiedo, kaj ene ekviglas la tiel nomataj spiritoj.

Sur la bela Mingshan-monto altas maljunaj arboj, inter kiuj kaŝiĝas antikvaj temploj. Interese, tie ekzistas samtempe konfuceanaj kaj budhismaj temploj, kaj ankaŭ la taoistoj nomas la monton unu el la 72 luliloj de fortuno. Tio montras, ke la tri skoloj, dumlonge malkonkordaj inter si, samopinias, ke la loko estas ideala por mortintoj.

Ĉe la montpiedo majestas pordego kun du nigraj ĉinaj ideogramoj signifantaj fantoman urbon. Mi eniris en la urbon tra la pordego, malantaŭ kiu mallarĝa ŝtona ŝtuparo kondukas al portalo kun leviĝanta tegment-rando kaj kvar ĉinaj ideogramoj signifantaj inferon. Mi daŭre supren iris kaj atingis la sidejon de la reganto de la infero.

Sur la montsupro staras Tianzi-templo, la plej granda en la loko, kie, laŭdire, la dio de infero plenumas sian regadon. Inter la montpiedo kaj tiu templo kuŝas Ve-ponto, Lageto de Sango, Infera Vojo, Pordo de Infero kaj Teraso por Rigardi Hejmlokon. Laŭlegende, ili estas dangerejoj, kiujn ĉiu fantomo nepre devas trapasi.

Ambaŭflanke de la grandioza pordo de la templo Tianzi, du ŝtonaj leonoj kun kolera mieno kaj akraj ungoj staras kiel gardistoj. Enpaŝinte tra la pordo, mi vidis kvar diostatuojn podu starantaj en la orienta kaj okcidenta kioskoj. Laŭdire, ili bonvenigas la bonkorajn fantomojn kaj kaptas la ferocajn demonojn.

En la mezo de la halo oni kultas la statuon de la dio de infero, altan je 6 m, en robo kaj kun krono sur la kapo kaj jada zono ĉe



Ĉe la pordo de la Fantoma Urbo

la talio. Liaj okuloj larĝe malfermitaj montras majestecon. Ambaŭflanke de li staras servistinoj iom pli malproksime liaj oficistoj kaj generaloj, i.a. la ĉefoj de la departementoj pri kontrolo, juĝo, premio kaj puno. En la ekstera akcesora domo dek marŝaloj staras en du vicoj kun brava kaj neofendebila mieno.

Estas kultata la diino de infero, la bela kaj milda edzino de la dio de infero, en niĉo en la malantaŭa halo. Luksa krono sidas sur ŝia kapo kaj brila mantelo sur ŝia korpo. Laŭdire, ŝi estis ĉarma fraŭlino de riĉa familio kaj venis kun sia patrino al la templo por incensi. Ŝia beleco tuj kaptis la koron de la dio de infero, kiu poste edziĝis al ŝi.

Plu irinte, ni vidis du longajn koridorojn ĉe la dekstra kaj maldekstra muroj, nomatajn orienta kaj okcidenta inferoj. Tie oni skulptis enniĉe ok timigajn leĝoplenumantojn, sub kiuj estas 18 torturejoj kun skulptaĵoj de ĉ. 100 torturataj fantomoj transformiĝintaj el malbonfarantoj.

Vizitinte la Fantoman Urbon, la turistoj trovis, ke la fantoma mondo similas al feŭda regno, kie la reĝo katenis siajn oficistojn per severa hierarkio kaj regis super sia popolo per kruela leĝo. Ĉu la fantoma mondo priskribita en legendoj ne estas reala feŭda socio? Ĉu tie ne speguliĝas iama surtera mondo? ■

Motorciklo — modo de ĉina urbeto

Teksto kaj fotoj de LI CHUNGENG

EN plej multaj urboj de Ĉinio, oni ĝenerale veturas per aŭtobuso aŭ bicklo. Kompreneble, tion decidas la ekonomio. Sed nun en iuj malfermaj urboj rapide evoluantaj, ekzemple en Shenzhen, Kantono, Foshan de Guangdong-provinco, rimarkeble multiĝas veturantoj per motorciklo.

Iutage, starante ĉe kruciĝejo de komerca strato de Foshan, mi vidis, ke motorcikloj preterpasas unu post alia, brue kaj fiere. Mi scivole kalkulis kaj konstatis, ke pli ol 20 diversspecaj motorcikloj preterpasis en malpli ol du minutoj.

“Kial estas tiom da motorcikloj ĉi tie?” Mi demandis iun lokan maljunulon.

“Vi estas alilokano, ĉu ne? Verdire, ankaŭ mi ne kutimiĝis al tio antaŭe.” Kaj ektorentis lia parolo: Antaŭ 15 jaroj, motorciklo estis preskaŭ tute ekster la listo de la konsumajoj por niaj urboj. Tiam Foshan estis nerimarinda metiindustria kaj komerca urbeto. En la lastaj jaroj, profitante el sia najbareco al Hongkongo kaj Aomen kaj helpe de siaj multnombraj elmigrintoj, Foshan aktive disvolvas eksteran komercon, funkciigas multajn entreprenojn, ĉu per alilandaj kapitaloj aŭ per investoj ĉinjalilandaj, kaj akiras bonan ekonomian efikon. Kun la disvolviĝo

de Foshan-urbeto plibeliĝas ĝia aspekto kaj altiĝas la vivnivelo de la loĝantaro.

En la urbeto Foshan servas malmulte da aŭtobusoj. En la trafika pretempo, estas malfacile enpuŝi sin en aŭtobuson. Kaj al junuloj ne plaĉas la malrapida biciklado. Do, iuj el la iom riĉaj biciklantoj unue havigis al si motorciklon. Oni akceptis ĝin, kiam nur malmulte da motorcikloj ekkuris sur la stratoj. Tuj poste di-

versspecaj malpezaj motorcikloj aperis unuj post aliaj.

Iu estro de la urbeta trafika departemento diris al mi: “Antaŭ 1980, ĉi tie estis nur dekelkaj privataj motorcikloj, sed nun estas jam pli ol ducent mil.”

“Ĉu ofte okazas trafikaj akcidentoj pro tiom da motorcikloj?”

“Malofte. Ĉar en la urbeto, estas malmulte da aŭtoj. La biciklantoj kaj la piedirantoj iras laŭ sia aparta vojo! Krome, estas

Al infanĝardeno





Garaĝo de motorcikloj

bone observata la trafika regularo. Ja sekureco estas ĉe ni.”

Foshan-anoj motorciklas tiel lerte, vige kaj senĝene, ke mi kore admiras ilin. La diverseco en la uzado de ilia motorciklo tute estas ekster mia imago. Per motorciklo, ili veturas al kaj de laboro, portas siajn infanojn al kaj de la infangardeno aŭ lernejo, komercetas, kunportante fiŝojn, viandon, kortbirdojn, legomojn k.s. al bazaro. Kaj oni povas motorcikle ankaŭ ekskursi, eĉ veturigi amikon al flughaveno aŭ stacidomo. Por multaj la motorciklo estas oportuna trafikilo, tamen por gejunuloj, ĝi ja estas eleganteco kaj romantiko. Kvankam motorciklo estas nemalmultekosta, tamen pli kaj pli da Foshan-anoj ekuzas ĝin. Iuj familioj eĉ havas plurajn motorciklojn. Iu foshan-ano diris: “Tio estas bezono kaj signo de rapidritma malferma urbo.” ■

Transporto de freŝaj legomoj al urbo





Virinoj veturantaj per motorcikloj

Riparejo de motorcikloj



Muziko kaj danco por

DE 1989, ĉiujare en septembro en la impona antikva Konfucea Templo en Qufu de Shandong-provinco okazas la Internacia Kultura Konfucea Festivalo. Tiam la klasika muziko por kulti Konfuceon sonis tra pluraj tagoj.

Konfuceo estas unu el la dek internaciaj kulturaj famuloj. Lia doktrino estis rigardata kiel morala kriterio en la feŭdisma socio de Ĉinio, kaj Konfuceo fariĝis idolo reprezentanta la ĉinan kulturan tradicion. Por memori lin, ĉinoj okazigis ĉiujare solenan kultadon, kaj la kultaj muziko kaj danco fariĝis grava konsistiga parto de la ceremonio.

Historia materialo notis, ke en la sekvanta jaro post la forpaso de Konfuceo en 479 a.K., monarko de Lu-regno prenis Konfucean loĝejon kiel templon kaj ordonis kulti lin ĉiujare. Imperiestro Liu Bang de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) kultis Konfuceon per ceremonio de la plej alta nivelo, kiun oni kutime faris nur por kulti la ĉielon, nome oferi porkon, bovon kaj ŝafon. En la postaj dinastioj la kultado havis nesamajn manierojn, sed daŭris ĝis 1949.

Antaŭ Sui-dinastio (581-618 p.K.) ne estis specialaj kultaj muziko kaj danco, kaj la imperiestro Yang Jian ordonis, ke muzikistoj verku kultan muzikon kun kanto,



Sceno el "Muziko kaj Danco por Kulti Konfuceon"

danco kaj muziko en kombino. La muziko estis ludata dum multaj dinastioj kaj perfektigis per kompletigado kaj rafinado. La specoj de muzikiloj, la nombro de dancantoj, la tekstoj de la kantoj, la kostumoj kaj la titoloj de la movimentoj ne estis samaj en malsamaj dinastioj. Por la kulta muziko oni uzis pli ol 20 specojn da muzikiloj, inter kiuj estis fluto, tamburo, *ĝu*, *ju*, *ĉing*, *ĉin*, *ŝjau* kaj *ŝeng*. La tekstoj de la kantoj, diferencaj en malsamaj dinastioj, sed estis prikantantaj Konfuceon ekskluzive. La kulta danco prezentis la naskiĝon, kreskadon, migradon kaj lekciadon kaj ver-

kadon de Konfuceo.

En 1984 ĉinoj rekomencis la regulan kultadon en Qufu, hejmloko de Konfuceo. En tiu jaro, okaze de la 2535-a datreveno de la naskiĝo de Konfuceo, instruistoj kaj studentoj de la Normala Universitato de Qufu establis orkestron de antikva muziko kaj prezentis la kultajn muzikon kaj dancon en la Konfucea Templo. La prezentado estis ŝatata de la ĉinoj kaj fremdlandanoj, kiuj interesiĝis pri Konfucea kulturo. Post tio, la artistoj de Shandong-provinco multe penis por prifosi heredaĵon de la kulta muziko por

kulti Konfuceon



Ludo de antikva muzikilo *ŝjaju*

Konfuceo kaj gajnis vastan atenton. En la 2540-a datreveno de la naskiĝo de Konfuceo okazis la Unua Konfucea Kultura Festivalo, en kiu ili prezentis grandtipajn kultajn muzikon kaj dancon. La prezentado estis komencita per 360 tamburfrapoj kaj 180 sonorilfrapoj. La dancantoj kaj la ĉefkultanto venis al sia posteno. Ili faris trifojan riverencon kaj tion sekvis ludo de muziko el 6 movimentoj. Kiam oni ludis la 1-an, 5-an kaj 6-an movimentojn, oni ne dancis, kaj kiam oni ludis la aliajn tri movimentojn, oni dancis. Ĉe la komenco de ĉiu movimento oni devis trifoje frapi

la muzikilon *ĝu*, kaj oni dancis en grupo el 36 aŭ 64 homoj. Fine la ĉefkultanto venis al abrikotlarbo, sub kiu Konfuceo lekciis. Ĉe tio kulta muziko venis al la fino.

Dum la Dua Internacia Konfucea Kultura Festivalo en 1990 oni prezentis, krom la kulta muziko por Konfuceo, ankaŭ la muzikon kun titolo *ŝjaŭŝaŭ*. Laŭ onidiro *ŝjaŭŝaŭ* estis sinteza muzikaĵo el teksto verkita de Jushun, unu el la kvin monarkoj en la pratempa Ĉinio, kaj lia justicoficisto Gaoyao. Ĉe la komenco la verko estis simpla popola amuzaĵo, poste ĝi estis utiligita de korte-

gaj muzikistoj. En Zhou(Ĝoŭ)-dinastio (11-a jc. a.K. — 256 a.K.) ĝi fariĝis tipa kortega muziko. Poste oni ludis la muzikon en kulto al dioj kaj foje ankaŭ en kulto al Konfuceo. En ĉ. 7-a jc. a.K. la ludo estis formuligita. La elekto de la ludantoj, muzikiloj, kostumoj, notacio kaj skalo de muziko estis difinitaj de la kortego; la instruado kaj lernado de la muziko estis tre rigoraj, tial la ludado de kulta muziko restis en hermetika kultura sfero, dank' al kio la muziko konservis la originalecon de la antikva kulta muziko. La nunaj *ŝjaŭŝaŭ*-muziko kaj kulta muziko por Konfuceo ebligis al la homoj ĝui la ritmon de la antikva kulta muziko daŭrinta pli ol mil jarojn.

Ŝjaŭŝaŭ-muziko komenciĝas per frapado de *ĝu*. Post tio oni trifoje frapas *taŭ* (speco de tamburo), la dancantoj tenantaj *ŝjaju* eniras en la dancejon en du vicoj, kondukate de totemaj flagoj. Unu el la muzikoludantoj frapas sonorilon. Tio estas nomata "ora sono". En harmonia kunludo de muzikiloj la dancantoj komencas dancon. Tion sekvas "centbesta danco". Knabinoj en birdforma krono kaj flava pluma vesto dancas birdan dancon kaj junuloj en bestoforma ĉapelo, bestoforma masko kaj bruna vesto dancas bestan dancon. Dum dancado enĉiĝas de kvar flankoj kvar falangoj simbolantaj la diojn de la kvar direktoj, nome Nigra Drako, Blanka Tigro, Ruĝa Birdo kaj Nigra Testudo. Pli poste la birdoj kaj la bestoj kune dancas sub la gvido de fenikso kaj feniksino. La impona sceno simbolas feliĉon kaj pacon de la socio. Post la kulmino de muziko kaj danco estas finalo signata per frapo sur *ĉing*, kio estas nomata "jada vibrado".

Venos denove ora septembro, kaj oni baldaŭ frapos la sonorilon por inaŭguro de la Internacia Konfucea Kultura Festivalo en la Konfucea Templo en Qufu. Oni diras, ke ĉi-jare la tuta ludado estos pli impona kaj pli bela. ■



Tradicia ĉina geedziĝa ceremonio



La novgeedzoj genuantaj

Internacia

Teksto de XU FAN


Fotoj de SHEN RONG

La novgeedzoj irantaj al halo por geedziĝa ceremonio



Flirtis koloraj flagoj, sonadis *surna*-oj kaj krakadis petardoj. Oni portis bunte dekoritan palankenon, en kiu sidas la brita novelzino Coss. En akompano de muziko oni portis ŝin al la pitoreskejo Okcidenta Monto de la urbo Mianyang. La ĉina novelzo Xu Zhongmin (Ŝju Gongmin), tie atendanta la novelzinon, ĵetis al ŝi ruĝan silkan rubandon kaj kondukis ŝin en ceremonian halon hele iluminitan de ruĝaj kandeloj. La novgeedzoj riverencis unue al la ĉielo kaj tero, poste al la gepatroj kaj bogepatroj kaj fine unu al la alia.

Xu Zhongmin amas belarton kaj antaŭ kelkaj jaroj sukcese trapasis la ekzamenon por studi en la ksilografia fakultato de la Belarta Instituto de Sichuan-provinco. Post diplomiĝo li estis postenigita en la Publika Arta



La patro benas
sian filinon en la
nupto.



La novgeedzoj kaj
ilia ĉina parenco

geedziĝo

Domo de Mianyang. Antaŭ du jaroj li venis al la Pekina Fremd-lingva Instituto por lerni la anglan lingvon. Tiam la brita fraŭlino Coss estis lernanta la ĉinan lingvon. Ŝi rigardis la ekspozicion de pentraĵoj de Xu Zhongmin kaj estis multe interesata. Dank' al la helpo de amiko ŝi konatiĝis kun Xu kaj poste enamiĝis al li. Ilia amo estis aprobita de iliaj gepatroj. Ili decidis okazigi sian nupton en ĉina maniero. Brita ŝtatoficisto Kosken kaj fratino de Coss flugis al Mianyang por ĉeesti la ceremonion. Li estis tre ĝoja pro la filino kaj intime diris al la ĉinaj boparencoj: "Bone, bone! Mi tre dankas vin."

Nun la novgeedzoj estas lernantaj la hispanan lingvon en Barcelono.

En la nupto



Invento de ĉinaj studentoj

LA unua tagdeko de novembro 1992 estis ĝojigaj tagoj por ĉinaj studentoj, ĉar tiam okazis en Pekino ekspozicio de scienc-teknikaj inventaĵoj de ĉinaj studentoj. Al la ekspozicio 600 ĉinaj altlernejoj prezentis 5 000 scienc-teknikajn fruktojn, el kiuj 470 estis eksponataj kaj 193 premiitaj.

Ĉi-foje la aktivado diferencis de la antaŭaj similaj ekspozicioj en tio, ke la organizantoj faris la ekspozicion granda negoco de scienc-teknikaj fruktoj. Delegitoj de proksimume mil entreprenoj kun granda intereso partoprenis diskutadon pri transdono de scienc-teknikaj fruktoj kaj faris traktadon pri 120 milionoj da juanoj, el kiuj 8.17 milionoj da juanoj estis jam donitaj.

La aŭkcio de 8 premiitaj scienc-teknikaj fruktoj puŝis la aktivadon al la kulmino. Post intensa aŭkcia oferto oni vendis scienc-teknikajn fruktojn kun totala valoro de 2.85 milionoj da juanoj. La invento

Tian Chunliang, studento de la Harbina Politekniko, konigas sian inventon al entreprenisto.



pri fabrikado de ultramikrona magneta pulvoro estis unu el la 3 speciale premiitaj inventaĵoj. La inventintoj estis Gu Hongchen kaj aliaj du studentoj de la Orientĉinia Kemiindustria Instituto. Oni komencis aŭkcii tiun patentitan inventon je miliono da juanoj, kaj kiam la Ŝanhaja Fabriko de Pres-inko proponis 2 milionojn da juanoj, neniu povis konkuri kun ĝi kaj ĝi sukcesis aĉeti la teknikon.

La novaĵo, ke studento subite fariĝis milionulo, faris sensacion en la pekina ĵurnalista rondo en la jarfino de 1992. La Ĉina Centra Televido ne nur tuj telesendis la aŭkcion, sed ankaŭ okazigis vesperon "Scienco — Junularo — 21-a Jarcento", kiu temas pri la aŭkcio. La vespero estis telesendita en la oraj horoj de la lasta tagdeko de decembro. *Renmin Ribao* kaj aliaj influaj ĵurnaloj publikigis la novaĵon en rimarkinda loko de sia titola paĝo. Ĵurnalistoj, fakuloj kaj entreprenistoj faris analizon kaj diskuton pri tio de malsamaj starpunktoj.

SCIENC-TEKNIKAJ REZERVISTOJ

Ĉi-foje estis eksponataj inventaĵoj maŝinaj, elektronikaj, kemiindustriaj, komputoraj, telekomunikaj k.a. Fakuloj opinias, ke tiuj inventaĵoj estas novaj en projektado, praktikaj en uzado, avangardaj en teknologio kaj simplaj en produkta procedo, malalt-produktokostaj kaj profitodonaj kaj plie ili estas facile vendataj. El ili la plej eminentaj inventaĵoj, kia "adherigilo de histoj de vivaj estaĵoj" farita de studentoj de Jilin(Ĝjilin)-universitato, atingis la internacian avangardan nivelon. Inter la eksponataj fruktoj estis ankaŭ la unuaj inventaĵoj en Ĉinio, kia la tekniko pri fabrikado de ultramikrona magneta pulvoro. Fakuloj laŭdis, ke la studentoj, kiel scienc-teknikaj rezervistoj de Ĉinio, ludas gravan rolon en disvolvo de scienco kaj tekniko kaj prosperigo de ekonomio.

Faktoj montris, ke la 2 milionoj da ĉinaj studentoj havas grandan latentan forton kaj fervoron por scienc-teknika inventado. Laŭ statistiko, en Ĉinio 1 000 altlernejoj nun estas sin okupantaj pri esplorado de 80 000 scienc-teknikaj temoj. La eminentaj inventaĵoj de tiuj lernejoj, kiuj gajnis premiojn de la ŝtato en la lastaj jaroj, plejparte estis kunlabore faritaj de instruistoj, studentoj kaj studentoj por

doktoriĝo kaj magistriĝo. Laŭ nekompleta enketado pri 17 altlernejoj de Pekino, Ŝanhajo, Jiangsu (Ĝjangsu) kaj Hubei, en la pasintaj du jaroj iliaj studentoj plenumis entute 5 000 inventojn, kiuj jam donis profiton. En Qinghua (Ĉinghŭa)-universitato okazis ekspozicio en 1992, kie vidiĝis 1 135 scienc-teknikaj inventaĵoj faritaj post la lecionoj.

En la lastaj jaroj la studentoj faris aktivan postlecionan scienc-teknikan esploradon kaj multajn scienc-teknikajn inventojn, tamen nur malmultaj el ili estas aplikitaj al produktado. Tion bone ekzemplis, ke la Pekina Politeknika Universitato gajnis 48 premiojn en ekspozicio de scienc-teknikaj fruktoj organizita de la Maŝinindustria Ministerio, sed nur 1/4 estis uzata en produktado.

Oni opiniis, ke la ĉi-foja ekspozicio ne nur kuraĝigis la studentojn en ilia inventado, sed ankaŭ pavimis realan vojon, por ke iliaj scienc-teknikaj fruktoj estu sukcese transdonitaj al entreprenoj. Tio estas senprecedenca kaj havas profundan signifon.

“Unu el niaj celoj okazigi la ekspozicion estas kiel eble plej rapide turni scienc-teknikajn inventojn de la studentoj en varojn, por ke ili estu utilaj al la popolo,” diris s-ro Zhang Zhengyu (Ĝang Ĝengju), unu el la organizantoj de la ekspozicio.

“Profitante tiun ekspozicion, ni fondos kiel eble plej baldaŭ scienc-teknikan foiron de studentoj por konstrui ponton inter la scienc-teknikaj fruktoj de studentoj kaj la realaj produktaj fortoj,” aldonis s-ro Li Keqiang (Li Keĉjang), alia organizanto de la ekspozicio. “Oni baldaŭ starigos institucion, kiu funkcios kiel aparta establaĵo por organizi similajn aktivadojn en la estonteco.”

STUDO POR APLIKO

Kiel apliki la studitajn objektojn, tio estis alia grava temo diskutata en la ekspozicio. En la scienca ĵurnalo *Keji Ribao* publikigis komentaria artikolo, kiu prezentis la publikan opinion. La artikolo diras, ke la novgeneraciaj studentoj, kiuj transvivos tiun ĉi jarcenton, nepre devas iri el la maro de scioj kaj rekte sin turni al la merkato, por ke iliaj akiritaj scioj estu ekzamenitaj kaj ili lernu kaj praktiku laŭ la bezono de la merkato.

S-ro Xiong Boqing (Ŝjong Boĉing) de la Scienc-teknika Universitato de Pekino, unu el la famuloj de la ekspozicio, estis raportita de multaj ĵurnaloj. Li kaj lia kamarado inventis novtipan, alt-efikan lakoforigilon. En la aŭkcio iu entrepreno aĉetis la vendorajton de la lakoforigilo per 300 000 juanoj. Antaŭ tio la teknologio de la lakoforigilo jam estis donita al 5 fabrikoj de Shenyang, Pekino kaj Zhuhai (Ĝuhaj), kiuj ricevis milionojn da juanoj. Fakuloj diris, ke la sintezaj normoj de la inventaĵo de

s-ro Xiong superis tiujn de la eksterlandaj samspecaj produktoj. Lia inventaĵo forigas lakon 5-oble pli rapide ol la alilandaj samspecaj produktoj, kaj plie ĝi estas nevenena kaj nekoroda. Ĝia produktokosto estas malalta kaj la prezo egalas nur 1/3 de tiu de la alilandaj samspecaj produktoj.

S-ro Xiong diris, ke li kaj lia kolego decidis fari inventon post esplorado de la enlanda merkato. Antaŭ 2 jaroj ili informigis, ke lakoforigilo estas vaste uzata, tamen pro la postiginteco de la teknologio en Ĉinio, oni devis importi la multekostajn japanajn kaj germanajn varojn. Do ili faris eksperimenton kaj sukcese montris sian inventaĵon en la merkato.

“Sen esplorado en la socio, sen ĝusta kono de merkataj informoj, ni povas nur ŝlosi nin en laboratorio kaj neniel sukcesos fabriki varojn bonvenajn al la publiko,” diris s-ro Xiong.

Eĉ se oni farus inventaĵojn bezonatajn de la socio sen forta konscio pri merkato de la varoj, la inventaĵoj povus esti nur metitaj flanken kaj eĉ komplete ignoritaj. La ĵurnalo *Guangming Ribao* raportis pri s-ro Xiong kaj samtempe menciis alian studenton Jin Jian (Ĝin Ĝjan) de la Nanchang-a Aeronautika Instituto. S-ro Jin iam inventis similan teknikon por forigi lakon, tamen neniu atentis ĝin en la teknika intertraktado. Kun bedaŭro diris s-ro Zhou Ya (Goŭ Ja), instruisto de Jin, ke s-ro Jin eble pli frue inventis la lakoforigilon ol s-ro Xiong, sed pro malatento de la teknika transdono lia invento malsukcesis en la merkata konkurenco.

La problemo pri apliko de lernitaj scioj estis atentata ankaŭ de la edukistaro kaj entreprenistaro. Profesoro Wang Xuan diris, ke en la pasinteco en la instruado de altlernejoj oni alte taksis la teoriajn sciojn, sed neglektis la kapablon de la studentoj apliki siajn sciojn kaj servi al la socio, kio malhelpis al la junuloj fariĝi talentuloj.

Entreprenistoj opinias, ke multaj studentoj estas mallertaj en solvo de aktualaj problemoj. Kvankam ili estas elstaraj en lernado, tamen vizaĝe al la merkato ili montriĝis nekapablaj, neinicativaj kaj nefortaj. “Tio multe maltrankviligas tiujn kompaniojn, kiuj volas akcepti diplomitojn de altlernejoj,” diris s-ro Liu Chuanzhi (Liŭ Ĉuangŝi), ĝenerala direktoro de iu pekina kompanio.

Oni povas diri, ke la sukcesoj de la junaj inventintoj ne nur grave edifis pli da studentoj, sed ankaŭ donis ian sugeston al la instruantoj. Pluraj fakuloj, kiuj laboris en la ekspozicio kaj multe helpis la studentojn, diris, ke la eduka sistemo devas pli rapide reformiĝi kaj intime ligiĝi kun la scienc-teknika progreso, merkataj bezonoj kaj ekonomia disvolviĝo kaj plie oni devas ĉiamaniere levi la kapablon de la studentoj apliki la lernitajn sciojn por solvi la praktikajn problemojn. ■

ZHANG QINGZHEN:

SOLENA SPORTKUNVENO DE LA ORIENTA AZIO

*La suno leviĝas en l' Orienta Azio,
Ĉi tie naskiĝis homa civilizacio...*

Jen teksto de la kanto "Leviĝanta l' Orienta Azio". Nun la sportoj, kiel grava marko de la moderna civilizacio de la Orienta Azio, estas pli kaj multe atentataj de la publiko. La Unua Sportkunveno de la Orienta Azio, okazigita en Ŝanhajo de la 18-a de majo, 1993, manifestis la unuiĝon kaj strebadon de la sportistoj de la Orienta Azio. Ĝi montris novan disvolviĝon de la sportoj en tiu ĉi parto de la terglobo.



"JUNAJ ESTAS PLEJ BONAJ"

La sportkunvenon partoprenis minimume 1 200 sportistoj el 9 landoj kaj regionoj de la Orienta Azio. Ili montris la plej altan sportan nivelon de Azio. En halterlevo, naĝo kaj atletiko ĉinaj kaj koreaj sportistoj 14-foje rompis 13 aziajn rekordojn. Ĉina knabino Zhang Lirong (Ĝang Lijong) kreis novan rekordon en la 3 000-metra vetkuro, je 6.5 sekundoj pli rapide ol la antaŭa azia rekordo, kreita de ŝi mem, kaj ankaŭ superis tiun de la

ĉampionino en la Olimpiaj Ludoj en Barcelono je 5.74 sekundoj. En halterlevo de la kategorio de 59 kg korea sportisto Zen Beng guan rompis du aziajn rekordojn, dank' al kio li fariĝis stelo de la sportkunveno.

Ke leviĝis junaj sportistoj, kiuj sentime defiis famajn sportistojn, tio estis evidenta trajto de la ĉi-foja sportkunveno. Ĉefa trejnisto de la japana naĝista teamo s-ro Suzuki diris, ke Japanio ne sendis veteranajn sportistojn al la sportkunveno ekskluzive. Li opiniis junajn sportistojn la plej bonaj. Tuj ĉe la komenco de la sportkunveno faktoj pruvis, ke liaj vortoj estas ĝustaj. La 16-jara japana naĝistino Maehare Jinmi dufoje venkis veteranan ĉinan naĝistinon Lin Li kaj gajnis oran medalon de la 200-metra miksonaĝo kaj 400-metra miksonaĝo. La 18-jara ĉina halterlevisto Yang Bin venkis faman korean sportiston kaj gajnis oran medalon en halterlevo de la kategorio de 54 kg per 262.5 kg. Li gajnis la unuan oran medalon de la Unua Sportkunveno de la Orienta Azio. Korea sportisto Jin Sen guk en la mallongdistanca vetkuro venkis ĉi-

Japana naĝistino Maehare Jinmi



najn sportistojn kaj gajnis premion. Wang Hui-zhen (Ŭang Hujĝen) el Taibei-a Delegacio de Ĉinio, gajnis oran medalon de 100-metra vetkuro kaj tiun de la 200-metra. Pro sia elstara rapideco ŝi estis honorita kiel fluga virino en la Orienta Azio. Aperis junaj novicoj ankaŭ en ĵudo, longosalto, korbo-pilko, piedpilko kaj gimnastikoj.

Kompreneble, oni laŭdis junajn sportistojn ne nur pro tio, ke ili gajnis ĉampionecon kaj medalojn, sed ankaŭ pro tio, ke en ili oni vidas esperon de la morgaŭo. Iuj el ili hodiaŭ ne estas spertaj kaj ne povas rivali kun veteranaj sportistoj. Ĝuste pro tio oni devas kuraĝigi ilin sin montri en la internaciaj konkursoj, tial estas prudente sendi junajn sportistojn en grandiozajn sportkunvenojn, kia tiu de la Orienta Azio.


En la 10-taga konkurso penadis kaj la junaj kaj la veteranaj sportistoj. En la kunveno Ĉinio gajnis 105 orajn medalojn, Japanio 25, la Respubliko de Koreio 23, la Korea Popol-demokratia Respubliko 10, la Taibei-a Delegacio de Ĉinio 6 kaj Hongkongo 1. En la streĉaj konkursoj kaj iliaj riĉaj rikoltoj oni klare vidis grandan progreson de la sportoj de la Orienta Azio.

HISTORIA ELEKTO

Vespere de la 18-a de majo, finiĝis la sportkunveno en la kanto "Leviĝanta l' Orienta Azio".


Oni diris, ke la sportkunveno estas historia evento, tio ne estas troiga. Nun ĉiuj scias, ke la modernaj olimpikoj jam fariĝis grava marko de la moderna civilizita socio. Oni bezonas sportojn por interŝanĝo. Por tiu bezono oni okazigas la Olimpikojn kaj kontinentajn sportkunvenojn, kiaj Sportkunvenoj Amerika, Afrika kaj Azia, kaj ankaŭ regionajn sportkunvenojn, kiaj la Mediteranea,

Ĉinaj kaj koreaj piedpilkistoj en konkurso



Ĉina halterlevisto Yang Bin en konkurso

Sportistino Chen Yuqin de Taibei, Ĉinio, gajnis la ĉampionecon de kegloludo per 1 302 poentoj.





Sportistoj de norda kaj suda Koreio en konkurso

Sudorient-azia, Sud-azia kaj Orient-azia Sportkunvenoj.

Statistikoj montris, ke la Orienta Azio estas la plej vigla loko de la mondo, kie ekonomio disvolvigas plej rapide de la lastaj jaroj. La tieaj popoloj bezonas diversajn kanalojn por fari kontaktojn kaj interŝanĝon por akceli la kunlaboron kaj disvolvigon de diversaj landoj kaj regionoj de la Orienta Azio. Oni okazigis la Sportkunvenon de la Orienta Azio, ĝuste por adaptiĝi al tiu situacio.

Okazigo de granda sportkunveno estas bona ŝanco por manifesti la ekonomiajn fortojn de iu lando kaj urbo. Ŝanhajo, kiu nun faras ĉion eblan por ekspluati Pudong-distrikton kaj restarigi sian lokon en la internaciaj financaj aferoj kaj internacia komercado, faris sian maksimuman penadon por la Unua Sportkunveno de la Orienta Azio. En tio la ŝanhaja popolo prezentis siajn sukcesojn atingitajn en la pasintaj 14 jaroj kaj montris sian idealan cirkonstancon por investado.

S-ro J. A. Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, aliaj 14 membroj de la komitato, respondeculoj de internaciaj sportaj organizaĵoj kaj diverslandaj raportistoj veturis al Ŝanhajo. Ĉi tie ili propraokule vidis la bonan organizadon de la sportkunveno, perfektajn konkur-

sajn instalaĵojn kaj progresajn teknikajn ekipaĵojn. S-ro Samaranch diris: "La inaŭguro de la sportkunveno estis brila. Ĝi profunde impresis min kaj miajn kolegojn."

MIRINDA RAPIDECO

Kiam la Olimpika Komitato de la Orienta Azio decidis okazigi sian unuan sportkunvenon en Ŝanhajo, en la urbo estis multaj problemoj malfacile solveblaj, kiaj oftaj obstrukcoj sur la mallarĝaj stratoj kaj malmoderneco de la sporthaloj.

Sed la plej granda malfacilo estis urĝeco de tempo. De la komenco de la prepara laboro ĝis la inaŭguro de la kunveno restis nur 16 monatoj, tamen la saĝaj kaj fervoraj ŝanhajanoj finfine venkis ĉiujn malfacilojn. Ili gajnis la tempon kaj ĝustatempe okazigis la sportkunvenon en sia bela urbo, kion la ĉinaj kaj eksterlandaj vizitantoj nomas "rapideco de la Sportkunveno de la Orienta Azio".

Antaŭ 9 jaroj oni sukcese okazigis la Los-Anĝelesajn Olimpikojn per socia mon-kolektado. Por okazigi la Sportkunvenon de la Orienta Azio oni bezonis 300 milionojn da juaĵoj, kio estis malfacilo nemalgranda. Ŝanhajo petis neniun groŝon de la ŝtato. Per diversaj kanaloj ĝi kolektis monon en la socio, tiel ke ĝi ne nur akiris la bezonatan sumon, sed ankaŭ iom pli.

Por garantii la sukceson de la sportkunveno Ŝanhajo riparigis la 114 ĉefajn ŝoseojn kaj samtempe alprenis iujn provizorajn rimedojn, por ke la trafiko estu glata dum la sportkunveno. Oni instaligis avantaĝajn ekipaĵojn en la Ĵurnalisma Centro, Ekzamena Centro de Analeptiko kaj la sporthaloj. Ŝanhajanoj metis 3 milionojn da florvazo sur stratojn kaj ĉe la sporthaloj. Tiam ĉie floris koloraj flagoj en la urbo.

En kelkaj landoj de la Orienta Azio oni opinias, ke flava mantuko simbolas feliĉon. La Orienta Televido de Ŝanhajo iniciatis aktivadon "Feliĉa Flava Mantuko", kiun partoprenis 25 mil ŝanhajanoj. Dum la sportkunveno antaŭ pordo de ĉiuj hoteloj, kie paslogis la sportistoj, floris flavaj mantukoj. Ankaŭ en la stadionoj oni ŝvingadis flavajn mantukojn por kuraĝigi la sportistojn.

Ankaŭ la amasa kalisteno en la inaŭguro de la sportkunveno montris la "rapidecon de la Sportkunveno de la Orienta Azio". La 8-an de decembro, 1992, oni decidis ŝanĝi la lokon de la inaŭguro kaj pro tio oni devis ŝanĝi la projekton pri la amasa kalisteno. Dek miloj da homoj pene sin ekzercis sur la sama spaco malgraŭ vento kaj pluvo. Finfine ili sukcese plenumis la taskon en mallonga tempo.

La brulanta fajro de la Unua Sportkunveno de la Orienta Azio estingigis post 10 tagoj. Ĝi tamen fariĝis preludo de la prosperiĝo de la sportoj en la Orienta Azio. ■

Kuracado de astmo

ASTMO estas malsano de la spira kanalo. Ĝenerale, la astmuloj suferas malfacilan spiron, sufokon, konvulsian tuson kun mukajo. La ĉin-medicinaj kuracistoj opinias, ke la ekscesa sindromo estas spirego, kiu gravigas pro malvarmo kaj ofte kaŭzas sputon de densa mukajo, dum la malsanuloj suferantaj astmon kaŭzitan de manko de vitala energio suferas palpitation kaj anhelon, kiu gravigas pro sporto, kaj ofte sputas maldensan mukajon.

Ekzamenante iliajn piedojn, oni trovas, ke ili iom ŝveligas kun purpuraj makuletoj sur la antaŭaj plandoj. Palpante la pormasaĝajn lokojn de la pulmoj kaj bronko, oni trovas malgrandan kordon, kaj kiam oni premas la pormasaĝajn lokojn de la brusto, la malsanuloj sentas sufokon.

Por kuraci astmon la ĉin-medicinaj kuracistoj ĝenerale faras masaĝon kaj konsilas al la

malsanuloj preni kuracan mangaĵon.

La ĉefaj pormasaĝaj lokoj por kuracado kaj sanprotektado estas pulmoj, bronko, nazo, mukosolvo, limfo en la supra korpo, limfaj angioj en la brusto, surrena glando kaj dikaj intestoj. La akcesoraj lokoj estas koro, renoj, tiroido, akcesora tiroido, torakaj vertebro, brusto kaj diafragmo.

Masaĝo: Masaĝu per la fingraj artikoj de ambaŭ manoj aŭ per la du flankoj de la pinto de la dika fingro aŭ per alia objekto. Premu malforte kaj malrapide malsanulon, suferantan astmon, kaŭzitan de manko de vitala energio. Premu forte kaj rapide astmulon, suferantan ekscesan sindromon. Ĉesu premi, tuj kiam la malsanulo sentas doloron. Masaĝu la ĉefajn pormasaĝajn lokojn 10 fojojn kaj la akcesorajn lokojn 6 fojojn.

Bildoj de la pormasaĝaj lokoj: 1. pulmoj; 2. bronko; 3. trakeo; 4. nazo; 5. mukosolvo; 6. limfaj angioj en la supra korto; 7. lim-

faj angioj en la brusto; 8. surrenaj glandoj; 9. dikaj intestoj; 10. koro; 11. renoj; 12. tiroido; 13. akcesora tiroido; 14. torakaj vertebro; 15. brusto; 16. diafragmo.


Kuracaj mangaĵoj:


1. Batu 3 koturnajn ovojn kaj bone kirlu ilin en bovlo. Versu bolantan akvon en la bovlon kun la kirlitaj ovo. Mangu ilin unu fojon ĉiutage ĝis resaniĝo.

2. Preparu 50 gramojn da nukso, 50 gramojn da amara abrikotkerno; 50 gramojn da zingibro kaj konvenan kvanton da mielo.

Infuzu la nuksojn kaj amaran abrikotkernon kaj forigu la malmolan ŝelon de la kernoj. Lavu la zingibron kaj dispecigu ĝin. Miksu ilin kun mielo kaj faru el ili granolojn. Dividu la granolojn en 10 dozojn kaj prenu unu dozon ĉiutage antaŭ enlitigo. La medikamento estas utila por la pulmoj kaj efika por kvietigi tusadon kaj forigi anheladon. ■

Bildoj de pormasaĝaj lokoj





Statuo de Yuto Yundangongbu

LAN SHAN:

Iom pri la tibeta medicino

LA tibeta medicino kun densaj naciaj koloroj estas resumo de la spertoj de la tibeta popolo vivanta sur la “monda tegmento” en longtempa konado kaj transformado de la naturo kaj preventado kaj kuracado de malsanoj. Ĝi estas grava konsistiga parto de la ĉina medicina trezorejo.

La tibeta medicino jam havas historion de 2 300 jaroj. En pluraj jarcentoj antaŭ la Kristo, la tibeta popolo konis en la longtempa praktikado, ke certe troviĝas kuracilo sentoksiga, se estas venena substanco. La eltrovo metis fundamenton por naskiĝo kaj disvolviĝo de la tibeta medicino.

“Ben-medicino” plej frue furoris en Tibeto. Tiam ne estis sistema teorio, oni kuracis ĉefe per primitivaj teknikoj, kiaj sangigo, fajro, ŝmirado kaj frotado. Krome, oni iom post iom eksciis haltigi sangadon per varma butero, kuraci traŭmaton per feĉo de sekala vino kaj forigi nutran toksigon. En kuracado de eksteraj vundoj kaj digestaj malsanoj, oni iom post iom konis la strukturon kaj movadan leĝon de la homa korpo kaj akumulis riĉajn spertojn.

En la 4-a jc. p.K. fama medicinisto de antikva Hindio venis en Tibeton kaj al tibetanoj konigis plurajn medicinajn klasikaĵojn, kiaj “Pulso-palpo”, “Medicinaĵoj” kaj “Vund-kuracado”. Tio akcelis evoluon de Ben-medicino. Ekde la 6-a jc. progreseca medicino de hancio enkondukigis en Tibeton. En la 7-a jc. princino Wencheng venis en Tibeton por edziniĝi al Sunzamkampo, reganto de Tubo-regno kaj alportis 404 receptojn, 5 diagnozojn, 6 kuracajn aparatojn kaj 4 medicinajn librojn. En la 8-a jc. princino Jincheng (Ĝinĉeng) venis en Tibeton, kun multe da medicinistoj kaj medicinaj libroj, el kiuj iuj poste tradukiĝis en la tibetan lingvon. Enkonduko de hinda kaj hana medicino multe riĉigis kaj disvolvis la tibetan medicinon. Dank’ al tio la tibeta medicino iom post iom maturiĝis.

En la regperiodo de Zanpuchi-songdezan, filo de princino Jincheng, la tibeta medicino multe disvolviĝis. Tiam aperis 9 famaj kuracistoj, el ili la plej renoma estis Yuto Yundangongbu, kiu kondukis la tibetan medicinon sur sistemigan kaj sciencan vojon.

Yuto Yundangongbu naskiĝis en la familio de reĝa kuracisto en

729. Li eklernis medicinon de la patro en sia infanaĝo. Li estis diligenta en la lernado kaj en la aĝo de 10 jaroj jam fariĝis kuracisto de reĝido. Por pluapaŝe altigi siajn teoriajn sciojn kaj kuracarton, juna Yuto trifoje vojaĝis al Hindio por lerni de famaj kuracistoj. Li uzis la ellernitaĵojn en la praktiko. Poste, venkinte multajn malfacilojn, li venis al Wutai-monto de Shanxi (Ŝanŝji)-provinco, kie li lernis de bonzo-kuracisto kaj ermitoj multajn sciojn. Reveninte Tibeton, li daŭrigis sian vojaĝon al diversaj lokoj por kuracado kaj medicin-instruado kaj serĉis diversajn popolajn receptojn, kio pli perfektigis lian kuracarton.

En sia 45-jaraĝo li komencis verkadon. Kun Tubo-medicino kiel la bazo, li serĉis diversajn medicinajn librojn de hanoj, hindoj k.a. Post 10-jara penema laboro li fine plenumis la klasikan tibet-medicinan verkon — “Medicino en Kvar Partoj”. La verko, kun 56 ĉapitroj el 241 000 vortoj, temas pri kvar partoj: ĝenerala principo, traktatoj, receptoj kaj postkuracaj flegado. En ĝi la aŭtoro detale klarigis fundamentan teorion, anatomion, diagnozojn kaj terapiojn, sanprotektion, funkciojn de medikamentoj, receptojn,

kuracajn principojn, malsano-preventon k.a. Poste, surbaze de la medicinaj fruktoj de Ĉinio kaj aliaj landoj, li kompilis pli ol 30 medicinajn verkojn kaj tiel formiĝis scienca sistemo de la tibeta medicino.

La "Medicino en Kvar Partoj", kiel bazŝtono de la tibeta medicina teorio, hodiaŭ estas ankaŭ studenda verko por tibetmedicinaj kuracistoj. Yuto Yundangongbu estas honorita kiel medicina sanktulo. Antaŭ la domo de la Tibetmedicina Hospitalo de la Aŭtonoma Regiono en Lhasa staras lia statuo. Sur gazono antaŭ la statuo estas alta incensujo. Multaj tibetaj malsanuloj tie incensas al la statuo por forbeni la malsanon antaŭ ol viziti kuraciston.

Disi Sangjiejiacuo estas alia elstara tibetmedicina kuracisto. Li verkis plurajn teoriajn librojn, sed lia plej granda kontribuo en la medicinaj aferoj estis, ke en 1703 sub lia gvido oni pentris 79 kolorajn bildojn por la "Medicino en Kvar Partoj", kiuj klare montras la profundajn teoriojn kaj terapiojn de la tibeta medicino. Ili, kiel rektaj, figuraj kaj vivecaj lerniloj, plifaciligas la konadon pri anatomio, patologio kaj farmacio.

Rilate la tibetan medicinon oni neniel forgesas la tibetajn medikamentojn. En la mezo de la 18-a jc. naskiĝis libro sub la titolo "Jinghu Bencao". Ĝi estas klasika farmakopeo de tibeta medicino, ampleksanta 2 298 specojn da vegetalaj, animalaj kaj mineralaj drogoj. Ĝi estas verkita de tibetmedicinaj kuracistoj, kiuj venkis eksterordinarajn malfacilojn en la kuraca praktiko sur la "monda tegmento".

Por prepari medikamentojn multaj tibetmedicinaj kuracistoj persone iras sur monton kaj en arbaron por kolekti diversajn drogojn en somero kaj aŭtuno. La preparitaj tibetmedicinaj medikamentoj konsistas aŭ el unusola drogo, aŭ el pluraj drogoj. Iuj konsistas eĉ el cent drogoj. En for-

mo ili ĉefe estas pilolo kaj ankaŭ de tizano, siropo, unĝento, eliksiro kaj pulvoro.

La tibetaj medikamentoj estas aparte efikaj por kuraci paralizon, cerban hemoragion, stomakan ulceron, atrofian stomakiton kaj aliajn kronikajn malsanojn. La tibetmedicinaj kuracistoj uzas pridemandon, observon de lango, pulso-palpon, analizon de urino kaj aliajn tradiciajn metodojn en diagnozo. En kuracado ili ĝenerale prenas antikvajn terapiojn, kiaj kupado, sangado, mokso, bano en likva medicinaĵo, kaj konsilas al la pacientoj preni multspecajn medikamentojn.


Tibetaj medicino kaj medikamentoj havas sian originalecon, tamen ĝis nun ne estas injektaĵo por urĝa savo. Pro tio la fako pri internaj malsanoj de la Tibetmedicina Hospitalo de la Aŭtonoma Regiono starigis klinikon kombinate la tibetan medicinon kun la okcidenta, por ke la tibetmedicinaj kuracistoj lernu kaj posedu avangardajn medicinajn teknikojn, pliigu sian kuracan sferon kaj altigu sian kuracan efikon.

La ŝtato alte taksas la tibetan medicinon. Ĉiujare ĝi asignas grandajn monsumojn por dis-

volvi tibetan higienan aferon. La tibetanoj senpage ricevas kuracodon en ĉiuj ŝtataj hospitaloj. En 1980 la ŝtato asignis 10 milionojn da juanoj por fondi la Tibetmedicinan Hospitalon de la Aŭtonoma Regiono en Lhasa. En la hospitalo bone ekipita servas tradiciaj tibetmedicinaj terapioj kaj instalaĵoj kaj ankaŭ modernaj terapioj kaj instalaĵoj, kiaj iks-radia esploro kaj elektrokardiografo. Kaj tiel la tibeta medicino pluapase disvolviĝis.

En la longa tempo la tibetmedicinaj kuracistoj transdonis siajn sciojn al siaj disĉiploj. Nun, la metodo ne povas kontentigi la bezonon de la medicinaj aferoj. En 1989 fondiĝis la Tibetmedicina Instituto sub la Tibeta Universitato por kulturi altnivelajn medicinistojn. Krom la supre menciita hospitalo fondiĝis ankaŭ 5 subregionaj kaj 6 guberninivelaj tibetmedicinaj hospitaloj. Kaj ĉiuj guberniaj hospitaloj havas tibetmedicinan fakon. Nun, en Tibeto funkcias pli ol mil tibetmedicinaj laborantoj. Dank' al ilia laboro la antikvaj tibetmedicinaj terapioj ludas sian apartan rolon en la kuracado. ■

Qiangba Chilie, direktoro de la Tibetmedicina Hospitalo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, en kuracado





Malgranda direktanto

Foto de DA WEI

Orkestroj en elementaj lernejoj

Foto de LI CHUNGENG

Por gajigi la infanojn, multaj elementaj lernejoj starigis orkestrojn de flutoj-tamburoj, violonoj, akordionoj, *erhu* (dukorda ĉina muzikilo) kaj latunaj instrumentoj. La infanoj sin ekzercas en la orkestroj post la lecionoj.

Nun cent el la elementaj lernejoj de Pekino havas tian orkestron. La fotoj, kiujn vi vidas, estis faritaj en la elementaj lernejoj Huayuancun B kaj Kangleli. La orkestro de fluto-tamburoj de la lernejo Huayuancun B havas pli ol 100 membrojn el la 2-6-aj klasoj. Unu jaron post la fondiĝo de la orkestro ili jam ellernis pli ol dek muzikajn verkojn. Ili ofte ludis por siaj gepatroj kaj por la publiko en festotagoj kaj ricevis iliajn laŭdojn.



Tamburado





Ludo en lernejo

Flutado



PETOJ PRI EKSTERLANDAJ PATENTOJ KAJ FABRIKMARKOJ EN ĈINIO

La Ĉina Patent-agentejo (Hongkongo), konigis, ke en la unuaj tri monatoj de 1993 ĝi traktis eksterlandajn patentojn kaj petojn pri fabrikmarkoj je 50% pli multe ol tiuj en la sama periodo de 1992.

En 1992 Ĉinio traktis sume 67 135 patentopetojn, je 34% pli multe ol tiuj en 1991. Inter ili 5 347 estis eksterlandaj, je 15% pli multe ol tiuj en 1991. Per la totala nombro de petoj Usono, Japanio kaj Germanio okupis la unuajn lokojn inter eksterlandaj patentopetantoj en Ĉinio. Fine de 1992 estis 366 202 validaj registritaj fabrikmarkoj, 53 230 el kiuj estis eksterlandaj. En 1992 la nombro de patentopetoj de Taiwan-aj entreprenistoj kreskis de 1 353 en 1991 al 3 391, je 146% pli multe. Koncerne la petojn de fabrikmarko-registrado, tiuj de Taiwan-aj entreprenistoj kreskis je 70%. Nun, la nombro de petoj pri fabrikmarko-registrado de Taiwan-aj entreprenistoj en la kontinento de Ĉinio atingis ĉ. dekmil, el kiuj duono estas registrita. Altirate de la bona ekonomia medio de Ĉinio, pli kaj pli multaj alilandaj entreprenistoj venis al Ĉinio por investado. La modifita patenta leĝo kaj ĝiaj detaloj efektivigataj de la 1-a de januaro 1993 pligrandigis la protektajn kampojn, pliigis la protektajn rimedojn kaj longigis la limtempon. Tio estas tre bonvena al eksterlandaj entreprenistoj. En la modifita leĝo estas aldonitaj protektoj de servomarkoj, defend-markoj, kolektivo-markoj kaj famaj markoj. Antaŭe Ĉinio ne traktis servomarkojn.

LOĜANTARO DE LA ĈINAJ NACIMALPLIMULTOJ

La kvara censo de Ĉinio en 1990 diris, ke la loĝantaro de la ĉinaj nacimalplimultoj kreskis de 67.24 milionoj en 1982, kiam oni faris la trian censon, al 91.35 milionoj, je 35.86% pli multe. Tamen en la sama periodo la totala loĝantaro de la lando kreskis je nur 12.45%. Rilate la aĝostrukturon, la nombro de nacimalplimultoj, kies infanoj konsistigas pli ol 40% de la totala loĝantaro de la nacio, reduktiĝis de 10 al 2, evidente, junaj loĝantoj iom post iom

fariĝis maturaĝaj. La totala strukturo montris, ke la pliiga tendenco de la loĝantaro daŭras.

Laŭ la analizo de demografoj, en 1981 la mortokvanto de beboj en la regionoj de nacimalplimultoj, escepte koreojn kaj manĉurojn, estis granda. En 1990 ĝi rimarkinde reduktiĝis, precipe tiu de uĝuroj, manĉuroj, kazaĥoj, bujioj kaj tibetanoj reduktiĝis je 5.6-3.8%. Samtempe kun tio la meznombra vivdaŭro de la nacioj plilongiĝis. Manĉuroj — 71.9 jarojn kaj hujoj — 70.6 jarojn, hanoj — 70.5 jarojn okupas la unuajn tri lokojn dum hanoj — 58 jarojn, tibetanoj — 61.6 jarojn kaj jioj — 61.7 jarojn kiuj okupas la lastajn tri lokojn. La meznombra vivdaŭro de la lastaj tri nacimalplimultoj plilongiĝis je 3-4 jaroj ol tiuj antaŭ 8 jaroj. Tio atestas, ke la sanstato de nacimalplimultoj multe pliboniĝis.

Fakuloj montris, ke la viv-kvalito de la nacimalplimultoj kun pli ol miliono da loĝantoj ĝenerale altiĝis. Iliaj sintezaj indicoj plejparte estas meznivelaj, interalie la mortokvanto de koreaj kaj manĉuraj malpli-ol-unujaraj infanoj estas sub tiu de la hanaj infanoj kaj la meznombra nivelo de la lando. La sintezaj indicoj de kulturo kaj edukado de la korea, manĉura kaj mongola nacioj jam superis tiujn de han-nacio. Tio montris, ke ili havas bonan materian vivon, bonajn kuracajn, higienajn kaj edukajn mediojn. La viv-kvalito de la nacioj hania, tibeta, bujia, jia, taja kaj mjaŭa estas relative malalta, i.a. la sintezaj indicoj de hanoj estas la plej malaltaj.

Demografio de diversaj nacioj estas grava esplortemo por Ĉinio. Koncernaj specialistoj montris, ke la ekonomio de nacimalplimultaj regionoj estas postiĝinta, kaj daŭre grandiĝas la distanco inter ili kaj la kompare progresaj regionoj. La malakordo inter la loĝantara kresko kaj la ekonomia kaj socia disvolviĝo de la nacimalplimultaj regionoj devas esti eliminata kiel eble plej baldaŭ. Estas necese turni grandan atenton al kvalito de nacimalplimultoj en loĝantara disvolviĝo. Koncerne tiun ĉi problemon, ĝuste diris iuj fakuloj, ke la urĝa tasko estas plibonigi la kuracajn kaj higienajn kondiĉojn de la ĉinaj nacimalplimultoj kaj ilian kulturan kaj edukajn nivelojn.

PUŜATE de la monda scienc-teknika revolucio, varieco de konsumado kaj mediprotektado, agrikulturo de la mondo paŝo post paŝo suriris la vojon de inteligentigo, unuiĝo de agrikulturo, industrio kaj komercado kaj mediprotekta agrikulturo.

INTELGENTIGO

Dank' al senĉesa sukceso de apliko de alta tekniko en agrikulturo, biofabriko ekpaŝis en la stadion de komercado. Biofabriko signifas sistemon, en kiu estaĵoj povas stabile reproduktiĝi tra la tuta jaro sub rigora media kontrolo. La sistemo komenciĝis en la lastaj 50-aj jaroj, sed ĝi ne estis disvastigita pro tro alta memkosto. En la 80-aj jaroj Usono, Japanio kaj kelkaj eŭropaj landoj starigis grandajn biofabrikojn, kiuj havas komercan valoron. En la fabrikoj oni kulturis legomojn, florojn kaj fungojn, bredis haliotojn kaj rikoltis ĝojigajn sukcesojn.

La alteknika agrikulturo en la futuro estos tre varia. Ekzistas tre reala ebleco rekte produkti fibron kaj mangaĵon per biotekniko. Usonanoj kaj hindoĵam elkulturis bonkvalitan kotonon en eksperimenta tubo per hista kulturado. Usonaj plantgenetikistoj elkulturis limonan substancon en ujo kun speciala likvaĵo, kaj dank' al tio oni povos produkti limonadon sen limono.

Evoluo de alta tekniko senĉese renovigas la kultivan manieron de la nuna agrikulturo. Tion ekzemplas "satelita kultivado" praktikata de laboratorio de kampa kultivado en Usono. La metodo estas nomata ankaŭ "fajna kultivado", t.e. laŭ la malsameco de la konsisto de la grundo, la fekundeco kaj la kreskado de la plantoj, oni uzas semojn, kemisterkon, herbicidon kaj insekticidon en adekvata kvanto. Eksperimento sur vasta terpeco pruvis, ke la "satelita kultivado" povas ne nur grandigi la produktokvanton kaj multigi enspezon, sed ankaŭ malmultigi malŝparon de insekticido, altigi la efikon de kemisterko kaj insekticido kaj moderigi median poluadon. Fakuloj opinias, ke "satelita kultivado" alportos tute novan ŝanĝiĝon al la agrikulturo en la futuro.

UNUIĜO DE AGRIKULTURO, INDUSTRIO KAJ KOMERCADO

La moderna agrikulturo rompita limigon de hermetikeco, monotoneco kaj aŭtarcio kaj disvolviĝas al makroagrikulturo unuiĝinta agrikulturon, industrion kaj komercadon kaj karakteriziĝanta per varieco, diferenceco kaj vasteco de cirkula tereno.

Ŝanĝi strukturon de agrikulturo kaj disvolvi fajnan agrikulturon. Fajna agrikulturo signifas kulturita altvalorajn agrikulturajn produktojn plej bezona-

CHI SHOUZHENG:

Kiel disvolviĝas agrikulturo de la mondo

tajn de la merkato, ekzemple altkvalitaj agrikulturaj plantoj, nobelaj floroj, altvaloraj farmaciaj plantoj, raraj bestoj kaj insektoj. Disvastigante fajnan agrikulturon, oni povas starigi apertan fruktoĝardenon, fari kortan plantadon, starigi arbaran amuzejon kaj bredejon de insektoj kaj birdoj kaj ankaŭ produktajn bazojn de diversaj varoj, kiuj povas beligi la medion.

Fortigi la merkatan konscion kaj akceli disvolviĝon de agrikulturo per merkata sistemo.

Nederlando estas la lando, kies porparcela produktokvanto estas la plej alta. Kvarono de la eksportaĵoj de Nederlando estas agrikulturaĵoj kaj ĝardenproduktaĵoj. La enspezo de la agrikulturo kaj ĝardenistiko konsistigas dekonon de la totala socia produktov valoro de Nederlando. Por tion efektiviĝi, oni devas serĉi kaj trovi ŝancon sur la merkato kaj fari baldaŭnan reagon.

Rapida renoviĝo de alta tekniko, precipe biotekniko, pli kaj pli intimigis agrikulturon kun industrio. Laŭ kalkulo, tri kvaronoj de la kemiaĵoj de la mondo povas esti farataj el agrikulturaj materialoj. Genetikistoj jam elkulturis medikamentecajn genokonvertitajn vegetalojn kaj animalojn. Sciencistoj trovis en grunda bakterio genon, el kiu oni povas fari plaston. Ili transmetis tian genon en kolzacon. Tia planto donas substancon turneblan en plaston. Evoluo de scienco kaj tekniko puŝas agrikulturon kaj industrion al la proceso de vertikala unuiĝo.

MEDIPROTEKTA TIPO


La tradicia agrikulturo karakterizata per alta investo kaj alta produkto neglektis mediprotektadon. La moderna agrikulturo postulas, ke ĝi kaj ekologia medio estu en sinkrona disvolviĝo.

Statistiko raportas, ke en la pasintaj 40 jaroj debobliĝis la kvanto de la uzita insekticido. Sed malgraŭ tio ankoraŭ duobliĝis la damaĝo kaŭzita de plantmalsano kaj insekto. Ankaŭ tro multa uzo de kemisterko damaĝis la medion. Tio igis la homojn elmeti la novan teorion pri mediprotekta agrikulturo aŭ alinome kontinue disolvebla agrikulturo, nome energie protekti la benignan cirkuladon kaj ekologian ekvilibron de la natura medio, samtempe kun pena disvolvigo de la agrikulturo. Ĝia celo estas starigi ekologian medion, en kiu ekonomia disvolviĝo de la socio konformas al la sano de la homaro; teni daŭran stabilan fekundecon kaj produktivecon de la grundo; racie protekti kaj utiligi la median riĉfonton por starigi novtipan agrikulturon de alta produktado, alta kvalito kaj altefika kontinua disvolviĝo. Multaj evoluigitaj landoj jam ellaboris rigoran leĝon por disvastigi tian agrikulturon. ■

EKONOMIO

● De 1979 ĝis 1992 Ĉinio jam utiligis en sia konstruado ĉ. 100 miliardojn da usonaj dolaroj investitaj de alilandanoj, inkl. 34 512 miliardojn da usonaj dolaroj rekte investitaj en Ĉinio. Kun pliboniĝo de la investa medio, alilandaj entreprenistoj investas en pli granda skalo kaj en pli vastaj regionoj kaj sferoj. En la lastaj dekelkaj jaroj la ĉina registaro jam sankciis starigon de 84 000 entreprenoj investitaj de alilandanoj. Ankaŭ en Ĉinio oni aplikas diversajn rimedojn kutime uzatajn internacie por enkonduki kapitalon. La laboro estas fruktodona.

● La Ĝenerala Ĉefurba Ŝtala Kompanio, kies jara produktokvanto jam atingis 5.7 milionojn da tunoj, rekonstruis sian ŝtalan fabrikan funkcion ekde la kvindekaj jaroj en modernan fabrikan kun jara produktokvanto de 3 milionoj da tunoj, per renovigo de ĝiaj malnovaj ekipaĵoj. La nova fabriko povas ŝtaligi



En la regadejo de la Tria Ŝtala Fabriko de la Ĝenerala Ĉefurba Ŝtala Kompanio



Manekenoj en la Ĉina Internacia Vesto-foiro

kaj laminati samtempe kaj laminati draton longan je 65 m en unu sekundo.

La kompanio rapidigis siajn paŝojn por entrepreni eksterlande. Ĝi jam aĉetis ŝtalajn fabrikojn kaj minejojn en Hongkong, Usono kaj Peruo kaj sukcesis havigi al si oceanan floton. Ĝi planas altigi sian jaran produktokvanton de ŝtalo al 20 milionoj da tunoj en la fino de ĉi jarcento.

● Antaŭ nelonge okazis en Pekino la Ĉina Internacia Vesto-foiro, kiun ĉeestis ĉ. 500 entreprenoj de Francio, Britio, Germanio, Japanio, Italio, Respubliko de Koreio, Ĉinio, Hongkong kaj Taiwan.

Ĉinio havas 40 000 vesto-fabrikojn, kiuj produktas ĉiujare 400 milionojn da vestoj. En 1992 Ĉinio profitis de la konfekcia eksporto ĉ. 17 miliardojn da usonaj dolaroj.

● Ĝis nun Ĉinio jam subskribis 1 623 kontraktojn komercajn kaj laborajn kun najbaraj landoj, kiaj Mongolio, Laoso, Vjetnamio kaj Popol-demokratia Respubliko de Koreio, kun membroj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj aliaj orienteŭropaj landoj. La kontraktita monsumo atingis 2.98 miliardojn da usonaj dolaroj, kaj pli ol 100 000 ĉinoj jam laboras laŭkontrakte en tiuj landoj.

● Ĝis la fino de 1992 Ĉinio jam havas 517 urbojn. Sed ĝi havis nur 58 urbojn en 1949. 300 el la 517 urboj estis konstruitaj, post kiam Ĉinio ekpraktikis la politikon de reformado kaj pordmalfermo.

KULTURO

● Antaŭ nelonge publikiĝis en Pekino la listo de filmoj gajnintaj la Registaran Premion de 1992. Inter la filmoj estas "Jiang Zhuying" pri la sinoferema ĉina sciencisto Jiang Zhuying (Ĝjang Ĝujing), "Ĉagrenitaj Virinoj" pri la psiko de modernaj ĉinaj virinoj, kaj "Familio sub Templo Tegmento" pri la vivo de posteuloj de Konfuceo. La Registara Premio estas starigita de la Ministerio de Radio, Filmo kaj Televido de Ĉinio. Ĝi kune kun la Premioj Jinji (Ĝingji) kaj Baihua estas la plej altaj premioj de la ĉinaj filmoj.

● Majon de 1993 en Fuzhou (Fuĝoŭ), urbo de suda Ĉinio, okazis la Tria Ĉina Teatra Festivalo kaj samtempe ceremonio por doni la ĉi-jaran Umefloran Premion al 22 junaj aŭ mezaĝaj aktoroj de opero, tradicia teatraĵo kaj moderna dramo. La aljuĝo de la premio okazas unufoje ĉiujare. En la festivalo oni prezentis 15 elstarajn programojn de 12 lokaj operoj.

● En la 46-a Internacia Filmo-festivalo de Cannes, Francio, la ĉina filmo "Lasta Vido" reĝisorita de la fama ĉina reĝisoro Chen Kaige gajnis la plej altan premion "Ora Palmo". La franca ĵurnalismo multe raportis pri tio kaj alte taksis la filmon.

"Lasta Vido" priskribas la fratecan amikecon, daŭrantan duonjarcenton, inter du aktoroj de pekina opero, kiuj jam en la knabeco lernis la arton ĉe iu majstro, poste iris zigzagan vivovojojn kaj travivis plurajn epokojn. La

filmo kun rapida ritmo kaj drama intrigo sukcese kaptas la rigardantojn. F-ino Gong Li, s-ro Zhang Guorong (Ĝang Ĝuofong) kaj s-ro Zhang Fengyi (Ĝang Fengji) ludas ĉefajn rolojn en la filmo.

- Nun la nombro de ĉinaj eldonejoj kreskis de 105 en 1979 al 520. En 1992 presiĝis pli ol 90 000 libroj okupantaj naŭonon de la totala nombro de la mondo; sed en 1979 la nombro estis nur 17 000. Inter la novaj libroj, multaj, precipe tiuj pri natura scienco, estas bonvenaj en la internacia libro-merkato.

- En la 20-a de aprilo, en Weifang, "urbo de kajtoj", Shandong-provinco, okazis la 10-a Weifang-a Internacia Kajto-festivalo kaj la Tria Tutlanda Kajto-konkurso. La festivalon ĉeestis pli ol 10 000 rigardantoj en- kaj eksterlandaj kaj pli ol 40 teamoj el 19 landoj kaj regionoj. Estis grandioza la spektaklo, ke ĉ. 10 000 homoj flugigis kajtojn kune.

En la konkurso la premion de la plej granda kajto oni aljuĝis al la kajto "Flamo" farita de japana ludanto, tiun de la plej longa kajto oni aljuĝis al ĉina kajto en formo de skolopendo kun draka kapo. Germana ludanto gajnis la specialan premion per sia alohava kajto.

SCIENCO KAJ TEKNIKO


- En la lastaj jaroj ĉinaj sciencistoj faris grandan progreson en studo de novgeneraciaj praktikaj satelitoj, el tiuj la telekomunika satelito "Dongfanghong 3" kaj la meteosatelito "Fengyun 2" jam venis al la lasta ŝtupo de farado.

Laŭ la plano, "Dongfanghong 3" funkcios 8 jarojn kaj portos 24 transsendajn aparatojn, kiuj povos transsendi kolor-televidajn programerojn en 6 kanaloj kaj 8 000 dudirektajn telefonvokojn. Nun solviĝis la ŝlosilaj problemoj de iliaj strukturo, pezo kaj kvalito. "Fengyun 2" povas fari nuban bildon pri videblaj brilo, infraruĝaj radioj kaj akvo en la aero. Ĝi gravas por altigi la nivelon de la ĉina vetera prognozo.

- Lastatempe la Geologia Fako de la Ĉina Akademio de Sciencoj prezentis al la registaro raporton, kiu montras ke en la lastaj jardekoj la marnivelo apud la ĉina marbordo altiĝis meze je 1.5 mm ĉiujare pro la varmiĝo de la klimato de la mondo kaj malleviĝo de la terkrusto. Antaŭvideble, ĝis la jaro 2050 altiĝos je ĉ. 40-60 cm la marnivelo ĉe la Delto de Perlo-rivero en suda Ĉinio, kaj pli multe altiĝos la marnivelo ĉe Ŝanhajo oriente kaj Tianjin (Tjanĝin) norde.

Post profunda esplorado sciencistoj prezentis serion da projektoj, dirante ke la temo "Influo de Altiĝo de Marnivelo al la Ĉina Ĉemara Regiono" devas esti enlistigita en la ĉefajn ŝtatajn sciencajn esplortemojn.

- En Changsha, ĉefurbo de Hunan-provinco, naskiĝis superkomputoro "Lakta Vojo II", kiu povas fari kalkuladon je pli ol miliardo da fojoj en unu sekundo. Post serioza ekzameno ĉ. cent ekspertoj opinias, ke ĝi jam atingis la internacian nivelon de la samspecaj aparatoj en



La superkomputoro "Lakta Vojo II"

la meza kaj posta periodoj de la okdekaj jaroj, kaj parte atingis la internacian avangardan nivelon. Ĝi servos en la Ĉina Ŝtata Meteocentro por prognozi veterstaton per donitaĵoj de la meza fazo.

MEDICINO

- Osta grefto estas ĉefa metodo por resanigi la malsanulojn de frakturo kaj aliaj ostaj malsanoj. Oni jam sukcesis transplanti en la korpon de malsanuloj la oston de ili mem aŭ de aliuloj. Nun profesorino Hu Yunyu, ĉina medicinistino, kun esplora grupo pri osta vundo sub sia gvido unuafoje sukcesis grefti prilaboritan bovan oston en homan korpon. Ŝia sukceso estas granda kontribuo por la teorio kaj kliniko de grefto de malsamspecaj ostoj. La afero restis kiel malfacilega temo de ostologio en la lastaj cent jaroj. Konsultinte La internacian dokumentan komputoran reton, oni trovis, ke la grefto fare de s-ino Hu kaj ŝiaj kolegoj estas la unua en la mondo.

- Pli kaj pli laŭtiĝas la voĉo "Ne fumu!". Tamen konsiderante, ke la voĉo ne povas esti tuj respondita ĉie, oni klopodas laŭeble redukti la malutilon de fumado.

S-ro Cheng Jie (Ĉeng Ĝje), ĉefkuracisto de la Medicina Universitato de Zhejiang(Ĝeĝĵiang)-provinco, laŭ la teorio de aera movforto, metis specialan aranĝaĵon en la filtran parton de cigaredo. Dum fumado la fumo de cigaredo moviĝas kiel vortico helpe de la aranĝaĵo, kiu efike sorbas tabakgudron. Laŭdire, la kreaĵo de s-ro Cheng estas efika por redukti tabakgudron. Nun s-ro Cheng jam ricevis ŝtatan patenton.

SOCIO

- Hodiaŭ en Kantono nemalmultaj homoj turnas sian atenton al komforta kaj kultura vivo. Moderna eleganta dekoracio anstataŭas la simplan. Al ordinara familio ne mankas lavmaŝino, fridujo, elektra marmito, elektra duŝilo kaj mikroonda kuirilo. Tial oni havas pli multe da libera tempo por sin klerigi kaj distri.

Pastomodlito Tang

Teksto de LI QIANG

Fotoj de LI CHUNGENG

EN Pekino troviĝas laborĉambro de “Pastomodlito Tang” en la deka etaĝo de la ĉefdomo de la Centra Belarta Instituto, la plej altnivela belarta lernejo en Ĉinio. En la laborĉambro mi renkontiĝis kun s-ro Tang Suguo, la plej elstara pastomodlito en Ĉinio, kaj rigardis dekojn da delikataj pastofiguroj faritaj de li, ekz. figuroj de Avalokitesvaro, la antikva ĉina poeto Qu Yuan (Ĉju Jūan), la sentimentala talentulino Lin Daiyu en la ĉina klasika romano “Songo en Ruĝa Buduaro”, la legenda dio Zhongkui (Ĝongkuj), kiu kaptas diablojn, la belega Violetta de la fama opero “La Traviata”... Ĉiuj tiuj pastofiguroj estas subtilaj kaj vivoveraj.

“Pastomodlito Tang” estis titolo de majstro Tang Zibo (1881-1970), iniciatinto de la pastomodlita arto. Lia filo Tang Suguo heredis lian aferon kaj lian titolon. En la infaneco Tang Suguo eklernis de sia patro pentradon kaj pastomodladon, kio metis por li solidan bazon de arto. Poste li studis skulptarton kaj olepentration en la arta fakultato de la Centra Belarta Instituto. Nun li estas vicprofesoro de la Ĉina Belarta Instituto.

S-ro Tang Suguo estas erudicia artisto. Li bone tuĉpentras. Li ŝatas antikvajn ĉinajn poemojn kaj ofte verkas versarojn. Li scipovas tapeti pentraĵon kaj bindi antikvan libron. Li montris al mi silkan skatolon, en kiu estas bele bindita “Albumo de Antikvaj Pentraĵoj” kun ligna kovrilo, kolekto de valoraj pentraĵoj de lia patro. Tang Suguo propramane tapetis la pentraĵojn kaj bindis la albumon. Dank’ al siaj multaj hobiaj, li fariĝis grandanima kaj liaj pastomodlaĵoj povas esti vivecaj kaj esprimriĉaj.

Je mencio de pastomodlado li torente parolis, kvazaŭ nombrante sian familian heredaĵon. Li diris, ke la pastomodlado havas historion de pli ol mil jaroj en Ĉinio. En la antikveco la pastomodlaĵoj estis simplaj, ekz., oni modlis figurojn de bovo kaj ŝafo por kulti diojn. Oni nomis ilin “kultaĵo”. En la kamparo de la baseno de la Flava Rivero, kiam okazas ceremonioj de geedziĝo, funebro kaj naskiĝtago, oni faras pastomodlaĵojn en formoj de animaloj, fruktoj kaj floroj kiel donacaĵojn aŭ kultaĵojn.

S-ro Tang konigis al mi la originalan pastomodlan arton de Heze, Shandong-provinco. Tie troviĝas

steleo starigita en la jaro 1854, kiu notis la altan nivelon de la tiea pastomodlado. Tiam la pastomodlaĵo transiris de kultaĵo al ludilo aŭ ornamaĵo, kiun oni vendis en bazaro aŭ foiro. Post esplorado kaj disvolvado de pluraj generacioj, la pastomodlado fariĝis aparta popola arto.

Poste aperis vagantaj popolartistoj. Ili surdorse portis lignan keston, modlis kaj vendis malgrandajn pastofigurojn ĉe stratoj. Ili faris paston el farunoj de glueca rizo kaj tritiko, miksis pigmenton kun la pasto kaj vaporumis ilin. Prenante tritikan tigon longan je 15 centimetroj kiel apogilon, la popolartistoj modlis sur ĝi pastajn figurojn de homoj, animaloj kaj floroj.

Majstro Tang Zibo estis studema kaj diligenta ekde la infanaĝo. En la 20-aj jaroj interesis lin la pastomodlado de popolartisto ĉe strato. Li aĉetis ĉe li iom da pasto kaj laŭ sia imago modlis pastofigurojn sen apogilo.


Ju pli majstro Tang Zibo interesiĝis pri pastomodlado, des pli delikataj fariĝis liaj pastofiguroj. Li ne plu aĉetis paston, sed mem faris pli bonan paston, kiu estas nealiformiĝema, nerompigema, neŝimema kaj rezista kontraŭ tineoj. Tiel la figuroj faritaj el tia pasto povas konserviĝi por kelkdek jaroj. Laŭdire, antaŭ 60 jaroj iu anglo akiris de majstro Tang pastofiguron, kiu konserviĝis sendifekta ĝis nun. Tang Zibo dediĉis sian vivon al pastomodlado kaj liaj pastomodlaĵoj elspiras apartecon. Li fariĝis la plej elstara pastomodlito siatempe en Ĉinio kaj estis honorita kiel majstro-pastomodlito.

Kiel sekvanto de la dua generacio de “Pastomodlito Tang”, s-ro Tang Suguo heredis la pastomodlan arton de la familio Tang kaj ensorbis sukcon de la artoj okcidenta kaj orienta, tiel ke liaj pastomodlaĵoj pliperfektigis. En la pasintaj jaroj kun ŝiaj pastofiguroj s-ro Tang travojaĝis Kanadon, Usonon, Meksikion, Sudan Amerikon, Singapuron, Japanion kaj Germanion. En Kanado pli ol 500 000 homoj vizitis ekspozicion de liaj pastofiguroj. Oficistoj de la ekspozicio miris, ke la malgrandaj ĉinaj pastofiguroj allogas tiel multe da rigardantoj.

Ĉe la adiaŭo s-ro Tang fingromontris la pastofigurojn kaj diris: “Mi neniam faris komercajn pastofigurojn. Ĉiu pastofiguro ĉi tie estas unika artaĵo.” Por serioza artisto, lia verko estas lia vivo. Iu japana fotografisto rigardis liajn pastofigurojn kaj emocie diris: “Mi perceptis ne nur la verkon, sed ankaŭ la tutan mondon malkaŝitan de ĝi.” S-ro Tang Suguo absorbiĝas en la studo kaj senĉese kreas pastofigurojn gustoplenajn, por ke la moderna stilo integriĝu al la tradicia ĉina pastomodla arto kaj ke la tuta mondo komprenu la artistojn kaj arton de Ĉinio. ■



Figuro en ĉina mito



Figuro en ĉina opero



Figuroj en antikvaj vestoj



Sur monta vojeto

Foto de **LI CHUNGENG**

